

OFICIALA JARLIBRO

DE LA

ESPERANTO-MOVADO

1926

14ª JARO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
12 BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE


AL
LIGA
STALBISKVITO
NI DANKAS NIAN
FORTE-CON
SANE-CON
VIVEME-CON
ENERGI-ON
N.V. BISCUITFABRIEKEN
„LIGA"
BERGEN OP ZOOM HOLLAND.

OFICIALA JARLIBRO

DE LA

ESPERANTO-MOVADO

1926

14a JARO

LEONARD ROMMCZEWSKI

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
12 BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE

Ĉiuj rajtoj rezervitaj



V- 18679

La enhavo de tiu Jarlibro ne povas esti represata,
ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de UEA.

ENHAVO.

Antaŭparolo 8

Unua parto: **Esperantismo.**

Adresoj de lingva-Komitatanoj 60
Blinduloj: internacia asocio 66
ĉeĥoslovaka societo 85
finna societo 90
hungara societo 98
Datoj el historio de Esperanto 37
Esperanto-Kongresoj 39
Pioniroj de la Esperantismo 41
Okazintaĵoj de la jaro 1925 48
Disvastigo de Esperanto 51
Gazetoj internaciaj 71
Bulteno de Scienca Asocio 74
Eklezia Revuo 73
Esperanta Ligilo (blindula) 72
Esperanto 71
Esperanto Triumfonta (estinta) 71
Espero Katolika 73
Espero Teozofia 73
Fervojisto 73
Fluganta Skribilo 73
Heroldo de Esperanto 71
Informanta Bulteno de P. T. T. 73
Interligilo de P. T. T. 72
Internacia Medicina Revuo 72
Internacia Radio Revuo 72
Internacia stenografisto 73
Katolika Mondo 73
Kolektanto 74
Ligilo por vidantoj 72
Literatura Mondo 71
Oomoto 74
Policisto 72
Sennacieca Revuo 72
Sennaciulo 72

Unuigita Tuthomara 73
Vegetarano 72
Gazetoj naciaj:
Amerika Esperantisto 116
Arbeider-Esperantisten 107
Arbeiter-Esperantist 93
Arguso (meksika) 105
Aŭroro (ĉeha blindula) 83
Aŭstria Esperantisto 76
Belga Esperantisto 77
Brazila Esperantisto 79
British Esperantist 80
Bulgara Esperantisto 81
Bulteno de Antverpena Komitato 78
Corriero Balcanico 101
Esperanta Studento 85
Esperanto (bulgara) 82
Esperanto-uutiset 89
Esperantský Zpravodaj 83
Forta voko 86
Germana Esperantisto 93
Hinda Esperantisto 107
Holanda Esperantisto 105
Hungara Esperantisto 98
Informoj de Estona Asocio 88
Intermembra Informilo 106
Internacia Lingvo 112
International Language 80
Itala Esperanta Revuo 101
Kataluna Esperantisto 97
Katolika Sento 101
Konkordo 113
Litova Stelo 104
Marto 83
Monde Esperantiste 91
Movado 91
Norvega Esperantisto 107
Pola Esperantisto 109
Portugal-Esperanto 110
Progreso 83
Revuo Orienta 99
Samosa-Esperantisto 95
Semisto 97

Socialisto 76
Soveta Esperantisto 111
Suda Kruco 75
Suno Hispana 97
Svenska Arbetar 114
Svenska Tidningen 113
Ukraina Stelo 109
Verda Lumo 85
Verda Ombro 99
Verda Utopio 99
Wereldtaal 105
Institutoj: internacia:
ĉeĥoslovaka 83
estona 88
finnlanda 89
germana 93
hungara 98
itala katedro 100
japana 99
Junularo:
bulgara 82
dana 86
katolika 65
skolta 80
tutmonda 70
Kalendaro internacia 10
Katolikoj:
unuiĝo internacia 65
aŭstria ligo 77
ĉeĥoslovaka ligo 85
ĉeĥoslovaka unuiĝo 85
franca ligo 92
germana ligo 95
itala unuiĝo 101
internacio (IKA) 65
junularo (MOKA) 65
nederlanda ligo 106
Laboristoj:
aŭstria ligo 77
finna asocio 90
germana asocio 93
hungara societo 97
nederlanda federacio 106

Organizo internacia:
Akademio 59
Blindula Asocio 66
Centra Komitato 55
Eklezia ligo 81
Fervojista Asocio (IAEF.) 63
Junula Asocio 70
Jurista societo 71
Konkordo (societo) 71
Konstanta Reprezentantaro 55, 58
Kristana Ligo 66
Kuracista Asocio 63
Kvekera Societo 81
Liberpensula Ligo 67
Lingva Komitato 59, 60
Literatura Asocio 68
Muziknotada Asocio 64
Poŝtoficista Ligo 64
Polica Ligo 68
Radio Asocio 69
Scienca Asocio 62
Sennacieca Asocio 65
Skolta Ligo 80
Sporta Ligo 71
Stenografia Asocio 64
Teozofia Ligo 66
Universala Esperanto-Asocio 59
Vegetara Ligo 68
Organizo nacia:
Argentina Asocio 75
Aŭstralazia Asocio 75
Aŭstria Delegitaro 76
Belga Ligo 77
Brazila Ligo 78
Brita Asocio 79
Bulgara Societo 81
Ĉeĥoslovaka Asocio 82
Dana Ligo 86
Danziga Asocio 87
Estona Asocio 88
Finnlanda Asocio 89
Franca Societo 90
Germana Asocio 92

Germana Ligo en Ĉeĥoslovakio 82
Hispana Asocio 96
Hungara Societo 97
Itala Federacio 100
Kataluna Federacio 96
Kuba Societo 102
Litova Asocio 104
Nederlanda Societo 105
Nord-Amerika Asocio 115
Norvega Ligo 107
Pola Asocio 109
Portugala Asocio 110
Riga Societo 103
Rumana Societo 110
Saarteritoria Ligo 112
Samosa Societo 95
Sveda Federacio 113
Svisa Societo 114
Sovetlanda Unuiĝo 111
Sudslava Ligo 112
Zemgalia Societo 103
Anoncoj . . . . . I—XXXII

Dua parto: **Universala Esperanto-Asocio.**

Adresaro 131
Centra Oficejo 132
Garantiantoj 133
Komisiono 131
Komitato 131
Laŭlanda listo de lokoj kie U E A estas reprezentata, vidu laŭlandan parton en 2ª parto "Esperantismo" 74
Membroj Dumvivaj 133
Membroj Honoraj 132
Teritoria Organizo 135
Anoncoj . . . . . XXXIII—LXVIII

ANTAŬPAROLO.

La nuna jarlibro, la dekkvara laŭ sinsekvo kaj la sepa post la milito, prezentas sin sub alia aranĝo ol la antaŭaj. Laŭ diversflanke esprimitaj deziroj ni forlasis por tiu-ĉi jaro la Enciklopedian parton kaj kompense aldonis artikoletojn kun esperantista karaktero. La nuna generacio esperantista malmulton scias pri nia historio, pri niaj pioniroj, niaj klopodoj. Havigi ioman scion pri tiuj historiaĵoj estas la celo de tiu-ĉi tutesperantista jarlibro. En la nova formo ĝi estas la komenco de io pli vasta kaj pli riĉa en la estonto.

Ni foje aludis pri la intenco doni al niaj membroj du jarlibrojn. Unua, kiu enhavus sciindaĵojn utilajn al internacia publiko, plaĉa kaj samtempe praktika en la aranĝo. La dua jarlibro estus la esperantista, enhavanta la kutimajn sciigojn pri nia movado, historio, dokumentoj en originala teksto kun traduko k. t. p. Ni jam ricevis tre valorajn sugestojn, kio pruvas la viglan intereson de la uzantoj pri la libro. Bedaŭrinde ankoraŭ ne venis la tempo por efektivigi ĉion; dependas de la pli forta subteno de la esperantistaro al UEA, konkrete sin esprimanta per pli vigla varbado kaj aliĝado.

La amplekso de la nuna jarlibro restas proksimume la sama pro la rimarkinda kresko de esp. organizaĵoj. Ĉu tiu-ĉi kresko pure interna respondas al kresko ekstera? Ni inklinas kredi, ke ne. Foliumante la libron oni trovas, ke estas certa "inflacio" (ŝveliĝo) de apartaj grupoj kaj grupetoj laŭfakaj. Estus konsilinde, ke la organizantoj atentu pli la kvaliton ol la kvanton; ne malgranda

nombro da fakaj grupiĝoj dankas la ekziston al tro rapida decido de fervoruloj, kiuj poste laciĝas vidante la amplekson de ĉiutage plenumota laboro detala, ne respondanta al la revoj kaj esperoj. Pro tio multaj tiaj kreaĵoj komencataj brile kaj esperplene fariĝas surpaperaj. Ili estas balasto de nia movado kaj malhelpas la bezonatan centrigon de la fortoj kaj rimedoj.

La redaktado de tia jarlibro postulas atenton pli ol eksterordinaran. Kritikoj ne mankas kaj ankaŭ neniam forestos. Estus dezirinde konservi okaze de prava plendo certan limon. Tio rilatas iujn teknikajn malhelpaĵojn nefacile forigeblajn. Unu el ĝi estas la regula plendo pri malfrua apero. Ni konfesas, ke ni mem ne estas kontentaj pri la nuna aperdato meze de la jaro. La apero de la jarlibro esence dependas de ŝanĝoj, okazantaj dum la vintro, kiuj devas nepre aperi. Ni provos, ĉu en la venonta jaro ni povu redakti tiel, ke la jarlibro aperu ĝis marto. Pliaj plendoj venas pro nekorekta skribado de nacilingvaj nomoj, lokoj k. t. p. Tie ni devas rimarkigi, ke ni kopias tiel, kiel ni ricevas de la koncernaj organizaĵoj kaj delegitoj. Estas grava helpo, kiun ĉiu povas plenumi: Skribi legeble aŭ imiti presliterojn precipe ĉe nomoj kun akcentoj malofte konataj. Vi multe helpas nin en nia laboro, evitas serĉadon en aktoj kaj libroj kaj forigas postan plendon. Necesis foje tion diri, ĉar la nezorgemo en tiaj detaloj jam pasas la limon permeseblan.

Ke la nova jarlibro trovu favoran akcepton ĉe nia membraro, ke ĝi servu kaj alportu utilon, estas nia deziro. Ke ĝi pligrandiĝu estonte estu via deziro, kies efektivigon vi akcelu per konstanta varbado al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

Hans Jakob,
Direktoro de UEA.

Internacia Kalendaro.

(Mallongigoj: * naskiĝis, † mortis, E. Esperanto.)

928-17

Januaro. I-a monato.

(La vorto "Januaro" devenas el latina nomo de dio Janus. Januaro estas vintromezo por Norda Duonglobo, kaj somermezo por Suda Duonglobo.)

1 V Novjaro. 1885 Fondo de Internacia Oficejo de Industria Proprajo, Bern. 1888 Fondo de Internacia Oficejo de Literatura Proprajo, Bern. 1898 Fondo de la Societo Franca por propagando de E. Apero de "L'Espérantiste", organo de la S. F. p. p. de E. 1923 Europa Konferenco de Horaroj, fondita en Luzern, por ĉiujaraj kunsidoj. 1912 Fondo de Internacia Farmacia Federacio, Hago.
2 S
3 D 1904 Prof. PEANO prezentas problemon de la helplingvo al Torina Scienca Akademio.
4 L 1813 * ISAAC PITMAN, fama angla stenografo.
1849 † F. X. GABELSBERGER, fama germana stenografo.
1902 Grupo "Lumo" fondita en Tirnovo, Bulgario.
5 M 1870 † A. GROSSELIN, fama franca stenografo kaj mondlingvano.
6 M 1916 † H. B. MUDIE, prezidinto de UEA kaj de Brita E. Asocio.
1920 Fondo de Internacia Unio por infanhelpo, Genève.
7 Ĵ 1904 Parolado de Prof. EVROT en liceo de Grenoble.
8 V 1867 † W. STOLZE, fama germana stenografo.
9 S 1865 * R. H. GEOGHEGAN, angla pioniro.
10 D 1860 A. T. von GRIMM publikigas programon pri kresta artefarita helplingvo.
1900 Parolado de Prof. CH LAMBERT en Dijon.
11 L 1902 Kurso gvidata de Prof. Th. CART ĉe Turing-Klubo, Paris.
1903 Fondo de E. grupo en Nancy.
1919 Brazila parlamento enkondukas E-on en ŝtato Sergipe.
12 M 1903 Fondo de unua E. grupo en London.
1919 Unua postmilita kunveno de Katalunaj E-istoj en Barcelona.
13 M
14 Ĵ 1898 Parolado de Prof. E. ROUX, Grenoble.
1898 Unua E. kurso en Francujo, gvidita de E. ROUX.
15 V
16 S 1919 Soveta Registaro disponigas al E. apartan domon en Moskva.

17 D 1868 * LOUIS COUTURAT, fama logikisto, autoro de la plej kompleta historio de mondlingvo, unu el kreintoj de Ido.
1901 Fondo de la Delegacio por adopto de internacia helplingvo, Paris.
18 L 1925 Starigo de la Zamenhofa Monumento, Warszawa.
19 M
20 M 1907 † Dro JAVAL, fama oftalmologo, protektinto kaj meceno de E. movado, ano de Franca Scienca Akademio.
21 Ĵ 1901 Fondo de la Grupo en Dijon.
22 V 1897 † ISAAC PITMAN, fama angla stenografo.
1912 † VAN DER BIEST, belga pioniro.
23 S
24 D
25 L 1902 Unua jarkunveno de Pariza Grupo.
26 M 1897 Fondo de la Klubo en Louhans, Francujo.
27 M 1844 † CH. NODIER, konata literaturisto, mondlingvano.
1923 Fondo de Internacia Unio kontrau la venera dangero, Paris.
28 Ĵ 1899 Raporto de E. NAVILLE, legita al la Franca Akademio.
29 V
30 S 1839 * Generalo H. SEBERT, ano de Franca Scienca Akademio, fondito de E. Centra Oficejo.
1880 * H. B. MUDIE, prezidinto de UEA kaj BEA.
31 D 1924 Unua E. disradiigo el Praha.

1928-18

Februaro. II-a monato.

(La vorto "Februaro" devenas el latina „Febris" = Febro, pro la malsanigaj ŝanĝoj de temperaturo. Februaro estas lasta vintra monato por Norda Duonglobo kaj lasta somera monato por Suda Duonglobo.)

1 L 1903 Fondo de Hispana E. Societo.
2 M 1911 † HORACE HUET, franca pioniro.
3 M 1757 * VOLNEY, fama franca orientalisto kaj filologo, autoro de la universala alfabeto, mondlingvano.
1859 * H. F. HÖVELER, kromnomita E. ĈEFEĈ, fama propagandisto de E., fondinto de la Ĉekbanko E-ista.
4 Ĵ, 5 V 1903 H. HODLER kaj E. PRIVAT fondas en Ĝenevo junulan grupon de E.
6 S 1902 Kurso gvidata de Prof. CLARAC en liceo Charlemagne, Paris.
7 D 1709 * CH. DE BROSSES, fama filologo kaj mondlingvano.
8 L 1833 * F. MOSCHELES, kon ataartamatoro kaj meceno, protektanto de E., en London.
9 M 1789 * F. GABELSBERGER, fama germana stenografo.
10 M 1923 † J. SEVENHUYSEN, holanda pioniro.
11 Ĵ 1650 † RENÉ DESCARTES, glora filozofo, matematikisto, mondlingvano.
12 V
13 S
14 D
15 L 1901 Fondo de Klubo "Stelo" en Plovdiv, Bulgario.
16 M
17 M 1922 Ministraro de Siberia Respubliko aprobas instruon de E. en lernejoj.
18 Ĵ 1899 Parolado de H. BEL en Cette, Francujo.
1910 Fondo de Internacia Skikomisiono, Oslo.
1921 E. oficiale enkondukita en 7-a klaso de Ĉenevaj lernejoj.
19 V
20 S
21 D
22 L
23 M
24 M
25 Ĵ
26 V
27 S
28 D 1920 † JOHN RHODES, angla pioniro.



La korto de l'kastelo de Trebsen apud Grimma
Laŭ originala akvaforto de J. H. Dreissigacker en Leipzig

★

NOVA PRESO-PROCEDO

FILMPRESO DE LA PRESEJO KAJ ARTMETIEJO

J. B. HIRSCHFELD (ARNO PRIES) LEIPZIG

BRÜDERSTRASSE 59

Marto. III-a monato.

(La vorto "Marto" devenas el latina nomo de dio "Mars". Marto estas unua monato de printempo por Norda Duonglobo kaj unua aŭtuna monato por Suda Duonglobo.)

1 L 1903 Klubo de Junaj Esperantistoj kaj la gazeto "Juna Esperantisto", fonditaj de H. HODLER kaj E. PRIVAT, Genève.
1921 Fondo de Internacia Asocio de Literaturistoj kaj Interŝanĝistoj, kun organo "Revue de l'Univers", Paris.
2 M
3 M 1898 Parolado de A. MAILLOUX, Nantes, Francujo.
1921 † Fino J. FINHOLDT, komitatanino de UEA.
4 Ĵ
5 V
6 S
7 D
8 L 1918 ROMAIN ROLLAND, fama verkisto, eldiras favoran opinion pri E.
9 M 1902 Parolado de E. BOIRAC, Lyon.
10 M 1898 Parolado de L. BLANJEAN, Roubaix.
1902 Parolado de E. GOUJON, Nice.
11 Ĵ * ANTONI GRABOWSKI, rusa-pola pioniro, unua verkinto en E., post Zamenhof, ano de E. Akademio.
12 V
13 S 1898 Parolado de Prof. SIBOURG, Valence, Francujo.
1902 Parolado de Prof. LOUVET, Lille, Francujo.
14 D 1904 Parolado de Prof. SABADELL, ĉe la Stenografia Akademio, Barcelona.
15 L 1886 Fondo de Internacia Interŝanĝa Servo, Bruxelles.
16 M
17 M
18 Ĵ 1898 Abato MARCHAND, publikigas sian lingvon "Dilpok".
1924 Unua E. disradiado en Genève.
19 V
20 S 1875 Internacia Konvencio pri la Metra Sistemo, kaj fondo de la Internacia Oficejo de pezoj kaj mezuroj; aliĝis 16 regnoj.
21 D 1910 Unua Itala Kongreso, Firenze.
22 L 1913 Dua Kongreso de Germana E. Laborista Asocio, Frankfurt a. M.
23 M
24 M 1892 Solena malfermo de Peterburga Societo "Espero" (fondita en 1891).

25 Ĵ 1901 Parolado de F. POSTNIKOV, Vladivostok, Siberio.
1922 Internacia Tutscienca Intelektula Ligo, fondita en New York.
26 V
27 S 1915 † SIFO, ĉina pioniro.
28 D 1592 * JAN KOMENSKY, kromnomita Comenius, fama pedagogo, mondlingvano.
1898 Fondo de "Kosmos" — Internacia Korespondada Unuiĝo, Amsterdam.
1900 Parolado de CH. MÉRAY kaj CH. LAMBERT, Dijon.
29 L
30 M 1920 † H. HODLER, prezidanto de UEA, redaktinto de "Esperanto".
31 M 1596 * RENÉ DESCARTES, glora filozofo, matematisto, mondlingvano.
1879 Abato SCHLEYER ekhavas ideon krei tutmondan lingvon.
1855 * TH. CART, prezidanto de E. Akademio.
1900 Parolado de G. MOCH, Paris.
1910 Unua Katolika E. Kongreso, Paris.
1921 Fondo de Internacia Antimilita Oficejo, Bilthoven, Nederlando.

Aprilo. IV-a monato.

(La vorto "Aprilo", devenas el latina formo de greka nomo de diino "Aphrodite". Aprilo estas mezo de printempo por Norda Duonglobo, kaj mezo de aŭtuno por Suda Duonglobo.)

1 Ĵ 1921 Fondo de Komisio Miksa de la Ruĝa Kruco Internacia, Genève.
1923 Internacia Konferenco pri uzo de E. en komerco, Venezia.
2 V 1912 Restarigo de la societo "Espero", Petersburg.
1923 Unua Iberia Kongreso, Valencia.
3 S 1926 Konferenco de ICK, KR kaj UEA, Locarno.
4 D 1900 Fondo de Internacia Biciklista Unio, Paris.
5 L 1913 Internacia Boksa Unio fondita en Paris.
6 M 1905 Fondo de "Internacia Societo por la Paco", Paris.
1924 Unua E. disradiado el Helsinki.
7 M 1795 Leĝa enkonduko de la Metra Sistemo, Paris.
1921 Deka konferenco de Internacia Ruĝa Kruco rekomendas E^on, Genève.
1924 Unua E. disradiado el Paris.
8 Ĵ 1886 Oficiale permeso de la "Franca Asocio por propagando de Volapük", Paris.
1900 Kurso de E. en Universitato de Dijon.
1913 Esperanta Festo en Petersburg.
9 V Raporto de H. SÉBERT kaj CH. MÉRAY en la Franca Scienca Akademio.
10 S 1902 Parolado de Prof. LOUVET, Lille.
11 D 1916 † TH. ROUSSEAU, vic-prezidinto de UEA.
12 L 1923 Unua E. disradiado el Moskva.
13 M 1918 E. Filatelia Ekspozicio, Budapest.
14 M 1917 † D^ro L. L. ZAMENHOF, Warszawa.
15 Ĵ 1925 Unua Kongreso de Radio-Amatoroj adoptas E^on.
16 V 1921 Refondo de Internacia Celpafa Unio, Paris.
17 S 1902 Parolado de J. RHODES, Keighley, Anglujo.
18 D 1922 Konferenco pri E. en lernejoj, Genève.
1926 Inaŭguro de Zamenhofa Monumento, Warszawa.
19 L 1892 Internacia Komisione starigas kemian terminaron.
1919 Kvina Finna Kongreso, Helsinki.
20 M 1907 K. BRUGMANN kaj A. LESKIEN kritikas E. kaj eblecon de internacia lingvo.
1913 E^a Festo kun partopreno de S^roj HERRIOT, GODART, CART, en Dijon.
21 M 1924 Konferenco de ICK, KR kaj UEA, Genève.
22 Ĵ 1924 Internacia Radiotelefona Konferenco rekomendis E^on, Genève.

23 V 1922 Fondo de Studkomisio por Societoj kooperativaj kaj laborista sekuraj, Roma.
24 S
25 D 1820 † VOLNEY, fama orientalisto, filologo, mondlingvano, aŭtoro de la universala alfabeto.
1866 * CARLO BOURLET, konata matematikisto, fama propagandinto de E., redaktinto de la "Revuo", 1906—1914.
26 L
27 M 1919 Tria Andaluzia Kunveno, Sevilla.
28 M 1903 † EMILE LOMBARD, redaktinto de "L'Etranger-Concordia", unua franca revuo favora al E.
1908 Fondo de Universala Esperanto-Asocio.
1915 Virina Pac-kongreso en Hago.
29 Ĵ 1780 * CH. NODIER, konata literaturisto, mondlingvano.
1899 Parolado de TH. RUYSSEN, La Rochelle.
1901 Kurso gvidata de LOUIS DE BEAUFRONT ĉe Turing-Klubo Franca, Paris.
30 V

Majo. V-a monato.

(La vorto „Majo" devenas el latina nomo de diino "Maia", patrino de Merkuro. Majo eŝtas lasta monato de printempo por Norda Duonglobo. kaj de aŭtuno por Suda Duonglobo.)

1 S Tutmonda laborista festo.
1926 Tria Ĉeĥoslovaka Kongreso, Bratislava.
2 D
3 L 1896 † E. HEINTZELER, aŭtoro de lingvo "Universala".
1900 Parolado de Dro KRIKORTZ, Stockholm.
1910 Unua Rusa Kongreso, Petersburg.
4 M 1859 * LÉON BOLLACK en Paris, konata pacifisto, aŭtoro de "Blua Lingvo".
5 M
6 Ĵ 1902 Fondo de la Grupo en Reims.
7 V 1777 † CH. DE BROSSES, fama filologo kaj mondlingvano.
1883 "Langue Néo-latine" prezentita de la aŭtoro E. COURTONNE, Nice.
8 S 1844 † J. L. BURNOUF, fama franca filologo, mondlingvano.
9 D 1910 Unua Mondkongreso de Internaciaj Asocioj, Bruxelles.
1926 Brazila Kongreso, en Espiritu Santo.
10 L 1913 Kongreso de la Franca Federacio, Auxerre.
11 M 1913 Brita E. Kongreso, en Eastbourne.
1913 Aŭstria E. Kongreso, en Graz.
12 M 1784 † A. COURT DE GÉBELIN, fama filologo kaj mondlingvano.
1913 Kvina Belga Kongreso, en Spa.
1913 Kvina Dana Jarkunveno, en Aarhus.
1913 Sesa Kongreso de Rodana Federacio, Valence.
13 Ĵ
14 V 1800 * A. GROSSELIN, fama franca stenografo kaj mondlingvisto.
15 S 1893 Volapüka Akademio elektas ROSENBERGER kiel prezidanton; li poste kreas novan lingvon "Idiom Neutral".
1910 Unua Aŭstria E. tago en Wien.
1924 Unua E. disradiado el Hamburg.
16 D 1898 A. HOLMES elektita direktoro de la „Akademi internasional de lingu Universal".
17 L
18 M 1889 Unua diplomata Pac-konferenco, en Hago.
19 M 1906 Fondo de Germana E. Societo, en Brunsvigo.
20 Ĵ 1798 * W. STOLZE, fama germana stenografo.
1875 Fondo de "Internacia Unio de pezoj kaj mezuroj", Paris.
21 V 1920 Dekunua Brita Kongreso, Birmingham.

22 S 1915 Oka Brita Kongreso, Bath.
1918 Jarkunveno de BEA en London.
23 D 1844 * ABDUL BAHA, fondinto de Bahaismo.
24 L 1920 Naŭa Belga Kongreso, St. Gilles.
25 M 1913 Festo ĉe la "Barcelona Stelo".
26 M 1902 Parolado de C. BOURLET en Reims.
1921 Dua Iberia Kunveno, Zaragoza.
27 Ĵ 1916 La prezidanto Woodrow Wilson, dum pacifista kunveno en Waŝington, unuafoje esprimas ideon pri la neceso de la Ligo de Nacioj.
28 V
29 S 1903 † Abato F. X. SOLIS, kanada pioniro.
30 D 1907 Internacia Unio de Akademioj malakceptas decidi pri la problemo de helplingvo, pro nekompetenteco.
1925 Unua Nederlanda Kongreso, Hilversum.
31 L 1596 * RENÉ DESCARTES, glora filozofo, matematisto, mondlingvano.
1778 † VOLTAIRE, fama verkisto, mondlingvano.
1900 Fondo de la Pariza Grupo.
1921 Fondo de Konstanta Oficejo de Internaciaj Sportaj Federacioj, Paris.

UNIVERSITÄTS-BIBLIOTHEK KÖLN

938.22

Junio. VI-a monato.

(La vorto "Junio" devenas el latina nomo "Juno" diino, edzino de Jupitro. Junio estas unua somera monato por Norda Duonglobo, kaj unua vintra monato por Suda Duonglobo.)

1 M 1889 Fondo de Moskva E. Rondeto.
1901 Prof. C. A. LAISANT kaj C. BOURLET elektitaj kiel vicprezidantoj de la Pariza Grupo.
2 M 1887 Unua libro de E. (antauparolo, gramatiko, legaĵo, radikaro) cenzure permesita en Warszawa.
1909 Fondo de Internacia Komitata por publikigo de ĉiujaraj tabeloj kun la nombroj de fiziko, kemio kaj teknologio, Paris.
3 Ĵ 1922 Franca ministro L. BÉRARD malpermesas E. kursojn en ŝtataj lernejoj.
1922 Unua Pola Kongreso, Warszawa.
4 V 1923 † Dro MYBS, akademiano kaj prezidinto de Germana E. Asocio.
5 S 1902 Parolado de kapitano CH. LEMAIRE, Bruxelles.
6 D 1919 Deka Brita Kongreso, Liverpool.
7 L
8 M 1900 Fondo de E. Grupo en Paris.
1913 Oka Skota Kongreso, Greenock.
9 M
10 Ĵ 1836 † A. AMPÈRE, fama fizikisto, mondlingvano, autoro de mondlingva projekto en 1793.
11 V 1915 Sveda E. tago, Norrköping.
12 S 1901 Parolado de Dro ROMAIN kaj LAPEYRE, Valence.
13 D
14 L 1902 Fondo de la Grupo en Grenoble.
15 M
16 M 1903 Fondo de unua itala grupo, de grafo GALLVIS, Riolunato.
1903 Fondo de Perua E. Societo, Lima.
17 Ĵ
18 V 1905 Fondo de gazeto "Esperanto", organo de UEA, de P. BERTHELOT.
1923 † Kolonelo POLLEN, angla propagandisto.
19 S 1915 Deka Skota Kongreso, Hamilton.
1922 Unua E. disradiado el Newark.
1924 Dua Iberia Kongreso, Bilbao.
20 D 1924 Angla Polico en Greklando adoptis Eon, en Ateno.
21 L
22 M 1918 Dekdua Skota Kongreso, Cowdenbeath.
23 M

24 Ĵ 1911 Dua Kataluna Kongreso, Tarragona.
1916 Dekunua Skota Kongreso, Linlithgow.
25 V 1905 † IVAN LOJKO, rusa pioniro kaj verkinto.
1906 Fondo de Internacia Loĝio de Neutralaj Bontemklanoj, Hago.
26 S
27 D 1909 Unua Belga Kongreso, Verviers.
28 L 1919 Dekkvara Skota Kongreso, Glasgow.
1919 Kontrakto de Versailles subskribita de 55 ŝtatoj.
29 M 1889 Unua Pacifista Mondkongreso, Paris.
30 M 1907 Fondo de Bohema Unio Ejista Bern.
1907 Fondo de Internacia Bindista Unio, Bern.

1928·23.

Julio. VII-a monato.

(La vorto "Julio" devenas el latina "Julius", nomo de roma imperiestro, kiu ordonis ordigi la kalendaron. Julio; estas somermezo por Norda Duonglobo, kaj vintromezo por Suda Duonglobo.)

1 Ĵ 1646 * LEIBNIZ, glora filozofo, mondlingvisto.
1875 Fondo de Tutmonda Poŝta Unio.
1921 Fondo de Internacia Unio de laboristoj barbiroj, Berlin.
2 V 1920 Kunveno de Australia Asocio, Melbourne.
3 S 1856 Unua raporto pri helplingvo, ĉe la "Internacia lingvista societo", Paris.
30,14 1921 † ANTONI GRABOWSKI, pioniro kaj unua, post Zamenhof, verkinto, akademiano.
4 D 1902 Scienca Akademio en Wien komisias al Prof. SCHUCHARDT sekvi la movadon de la helplingvo.
5 L 1890 Fondo de Internacia Oficejo por la publikigo de dogantarifoj, Bruxelles.
1913 Sveda E. tago, Gefle.
6 M
7 M
8 Ĵ 1920 Prusa Ministro de Instruado aprobas E^on.
9 V 1887 Parolado pri helplingvo, de F. DYER, London.
10 S 1915 Sepa Dana Jarkonveno, Odense.
11 D 1922 Fondo de Internacia Komisiono de Aernavigado, Paris.
12 L
13 M 1831 * SCHLEYER, autoro de Volapük, en Oberlauda, Baden.
14 M 1913 † R. DE LADEVÈZE, propagandisto, verkinto.
15 Ĵ 1901 Fondo de E. Societo en Brno.
16 V 1916 Kunveno de Nederlanda Societo, Haarlem.
17 S 1903 Malfermo de Perua E. Societo, Lima.
18 D
19 L 1908 Unua Usona Kongreso, Chautauqua.
1908 Fondo de Internacia Amatora Naĝista Federacio, London.
20 M 1891 A. KERKHOFFS eksiĝas el Volapüka Akademio, kaj tiel inicias la disfalon.
21 M 1905 Oka Internacia Stenografa Kongreso, Bruxelles.
1921 Fondo de Internacia Asocio por Infanprotekto, Bruxelles.
1921 Fondo de "Pax Romana" — Internacia Sekretariejo de Katolikaj Studentoj, Friburg.
22 Ĵ 1902 Fondo de Internacia Marstuda Konsilantaro, Kopenhago.
23 V 1893 Kvina Internacia Stenografa Kongreso, Chicago.
24 S
25 D

26 L 1911 Unua Kongreso de Rasoj, London.
27 M 1913 Unua Nederlanda Kongreso, Hago.
28 M 1910 Unua Kongreso de UEA, Augsburg.
29 Ĵ 1916 Sveda Jarkunveno, Stockholm.
30 V 1921 Dektria Kongreso de E., en Praha.
31 S 1925 Unua Somera Universitato Esperantista, Genève.
1926 Dekoka Kongreso de E., en Edinburgh.

Augusto. VIII-a monato.

(La vorto "Augusto" devenas el latina "Augustus", titolo de roma imperiestro. Augusto estas lasta somermonato por Norda Duonglobo, kaj lasta vintromonato por Suda Duonglobo.)

1 D 1909 Unua Rumana Kongreso, Bucuresti.
1910 Unua Kongreso de TEKA, Augsburg.
2 L 1914 Deka Kongreso de E., en Paris.
1923 Dekkvina Kongreso de E., en Nürnberg.
3 M 1887 Finpreso de la Unua Libro de E., Warszawa.
1900 Raporto de UNUEL (Zamenhof), legita de BEAUFRONT en kongreso de la Franca Asocio por progresigo de sciencoj.
1914 † LOUIS COUTRORAT, fama logikisto, autoro de la "plej kompleta historio de helplingvo, unu el kreintoj de Ido.
4 M
5 Ĵ 1905 Unua Kongreso de E., en Boulogne-sur-Mer.
1925 Unua Bahaa E. kunveno, en Genève.
6 V 1887 Dua Volapüka Kongreso kun 200 anoj, München.
1918 Unua Skandinava Kongreso, Gotenburg.
7 S 1904 Unua internacia eista kunveno en Calais.
8 D 1901 Fondo de Internacia Botanika Asocio, sidejo en Leiden, Nederlando.
1920 Dekdua Kongreso de E., en Hago.
1922 Dekkvara Kongreso de E., en Helsinki.
9 L 1887 Dro ZAMENHOF, edziĝis kun Fino KLARA SILBERNIK.
1890 Tria Internacia Stenografa Kongreso, München.
1905 Bulonja Deklaracio estas akceptita de la Unua kongreso.
10 M 1811 † S. TAYLOR, fama stenografo, autoro de la "Universala Stenografio".
1900 Sepa Internacia Stenografa Kongreso, Paris.
1924 Deksesa Kongreso de E., Wien.
11 M 1889 Dua Internacia Stenografa Kongreso, Paris.
1912 Oka Kongreso de E., Kraków.
12 Ĵ 1913 † CARLO BOURLET, konata matematikisto, fama propagandinto.
1922 Dua SAT-Kongreso, Frankfurt a. M.
13 V
14 S 1910 Sesa Kongreso de E., Washington.
15 D 1907 Internacia Scienca Asocio Eista, fondita dum la Tria Kongreso, gvidita de Prof. R. DE SAUSSURE.
16 L † A. WACKRILL, angla pioniro kaj verkinto.
17 M 1908 Kvara Kongreso de E., Dresden.
1913 Dua Rusa Kongreso, Kiev.

18 M 1897 Sesa Internacia Stenografa Kongreso, Stockholm.
1919 † STAN. SCHULHOF, esp. poeto.
1925 † Dro PAUL NUYTS.
19 Ĵ 1798 * AIMÉ PARIS, fama franca stenografo.
1889 Tria kaj lasta Volapüka Kongreso, Paris.
1913 Dua Hungara Kongreso, Arad.
20 V 1911 Sepa Kongreso de E., Antwerpen.
1913 Fondo de Internacia Atleta Federacio, Vesteras, Svedio.
21 S 1925 † A. CAUMONT (Basel), tradukinto de "For la batalilojn", porpaca romano de Baronino v. Suttner.
22 D 1915 Dekunua Kongreso de E., San Francisko.
23 L 1924 Dua Sudslava Kongreso, Split.
24 M 1913 Naua Kongreso de E., Bern.
1913 Unua oficiala poŝta ŝtampo en E., Bern.
25 M 1884 Unua Volapüka Kongreso, Friedrichshafen.
1919 Fondo de Internacia Asocio de Aertrafiko, Hago.
26 Ĵ 1851 * E. BOIRAC, rektoro de Diĵona Universitato, prezidinto de E. Akademio.
1860 * Pastro A. DOMBROVSKI, litova pioniro.
27 V 1911 Dua Kongreso de UEA, Antwerpen.
28 S 1687 † G. DALGARNO, mondlingvisto.
1906 Dua Kongreso de E., Genève.
29 D
30 L 1925 † J. SILBERNIK, bofrato de Dro Zamenhof, usona propagandinto, ĉefdelegito de UEA.
31 M

Septembro. IX-a monato.

(La vorto "Septembro" devenas el latina "septem" sep. Tiu monato estis vere la sepa kiam Romanoj havis Marton, kiel jarkomencon. Septembro estas unua monato de autuno por Norda Duonglobo, kaj de printempo por Suda Duonglobo.)

1 M 1889 Apero de la unua gazeto "Esperantisto", en Nürnberg.
1918 † H. F. Höveler, kromnomita Ĉefeĉ, fama propagandinto.
1923 La plej granda historie konata tertremo, Japanio.
2 Ĵ
3 V
4 S
5 D 1909 Kvina Kongreso de E., Barcelona.
1921 Dua ĝenerala kunveno de la Ligo de Nacioj.
6 L 1923 Unua Kunveno de la Ligo por defendo de indiĝenoj, Genève.
7 M 1903 Unua Jarkunveno de italaj espistoj, Firenze.
1920 Kongreso de Internaciaj Asocioj rekomendis E^on, Bruxelles.
8 M 1890 † L. Einstein, germana pioniro, eksvolapükisto.
9 Ĵ 1861 Ideo krei mondlingvon, ĉe pastro Eichhorn, aŭtoro de "Weltsprache".
10 V 1833 * E. Duployé, fama franca stenografo.
11 S
12 D 1922 Fondo de Tutmonda Bloko de la mezklasoj, Genève.
13 L 1816 * Ernest Naville, ĝeneva filozofo, amiko de E.
14 M 1775 * J. L. Burnouf, fama filologo, mondlingvano.
1908 Fondo de Internacia Centro Amerika Oficejo, Guatemala; kaj de Panamerika Poŝta Unio, en Montevideo.
15 M 1921 Dua Kunveno de la Ligo de Nacioj favore voĉdonas pri E., Genève.
16 Ĵ
17 V 1743 * Condorcet, fama sciencisto, mondlingvano, en Paris.
18 S
19 D
20 L 1917 † Emile Boirac, rektoro de Diĵona Universitato, prezidinto de E. Akademio.
1924 Kvina ĝenerala kunsido de la Ligo de Nacioj rekomendis E^on, kiel „klaran lingvon“ en telegrafio.
21 M 1922 Ĝenerala kunsido de la Ligo de Nacioj akceptas raporton pri E., prezentitan de la sekretariejo, Genève.
22 M
23 Ĵ 1925 † Léon Bollack, pacifisto, aŭtoro de la „Blua Lingvo“.
24 V 1903 Fondo de la grupo en Valencia, Hispanio.
25 S 1901 † V. Filipović, rusa pioniro, en Odessa.

26 D 1887 Unua Internacia Stenografa Kongreso, London.
1909 Unua Bohema E. Kongreso, Praha.
27 L 1891 Kvara Internacia Stenografa Kongreso, Berlin.
1903 Unua kunveno de Svisa E. Societo, Rolle.
28 M 1921 Fondo de Internacia Federacio de kristanaj oficistaj sindikatoj, Paris.
29 M
30 Ĵ 1714 * E. B. Condillac, fama franca filozofo kaj mondlingvano.

328.26.

Oktobro. X-a monato.

(La vorto "Oktobro" devenas el latina "octo" ok, kaj tiu monato estis vere la oka, kiam Romanoj komencis sian jaron en Marto. Oktobro estas aŭtunmezo por Norda Duonglobo, kaj printempa mezo por Suda Duonglobo.)

1 V 1887 * HECTOR HODLER, prezidinto de UEA.
1905 Fondo de Amerika E. Societo en Usono.
1920 Fondo de Internacia Federacio de Laboristaj Organizaĵoj, Amsterdam.
2 S 1862 † J. F. SUDRE, pedagogo kaj mondlingvisto.
3 D
4 L 1920 Kvina Itala E. Kongreso, Bologna.
5 M
6 M 1901 Malfermo de E. Societo en Vladivostok, Siberio.
1902 Fondo de Itala Societo por propagando de E.
7 Ĵ
8 V Fondo de Internacia Societo por historio de Medicino, Paris.
9 S 1874 Fondo de Universala Poŝta Unio, Bern.
10 D
11 L 1913 Festkunveno ĉe "Espero Kataluna", Barcelona.
12 M 1905 Fondo de Internacia Aeronaŭta Federacio, Paris.
13 M
14 Ĵ 1904 Fondo de Brita E. Asocio, London.
15 V 1890 Apero de „Nov Latin" de Dro D. ROSA, Torino.
1905 Fondo de Bolivia E. Societo.
16 S
17 D
18 L
19 M
20 M 1920 Ministro de Brunsvigo aprobas Eon.
1920 Fondo de Internacia Unio kontrau tuberkulozo, Paris.
21 Ĵ 1887 Amerika Filozofia Societo starigas komisionon por ekzameni Volapükon. Tiu komisiono ĝin malakceptis, sed ellaboris programon pri helplingvo, kiun realigis Dro ZAMENHOF ne sciante pri la programo de la komisiono.
22 V 1918 Kunveno de Australiaj Eistoj, Melbourne.
23 S 1898 Fondo de E. societo en Arhangelsk, Rusujo.
1903 Parolado de A. MICHAUX, Calais.
1921 Fondo de Internacia Framasona Asocio, Genève.
24 D 1907 La Komitato de la Delegacio por alpreno de internacia helplingvo akceptas Eon kun sangoj, proponitaj de anonimo "Ido".

25 L 1862 Adopto de Internacia Marsignala Kodo, de franca kaj angla registaroj.
26 M
27 M 1909 † Majoro COX, angla pioniro.
28 Ĵ 1900 † MAX MÜLLER, fama lingvisto, filologo, sanskritologo, kaj mondlingvano, kiu aprobis Eon.
29 V 1912 † HENRI DOR, konata oftalmologo kaj propagandisto de E.
30 S
31 D 1888 Fondo de la interparlamenta unuiĝo.

Novembro. XI-a monato.

(La vorto "Novembro" devenas el latina "novem" nau, kaj tiu monato estis vere la naŭa ĉe Romanoj kiuj komencis la jaron per Marto. Novembro estas lasta monato de autuno por Norda Duonglobo, kaj de printempo por Suda Duonglobo.)

1 L 1921 † Adam Zakrzewski, pola scienculo, autoro de "Historio de Esperanto".
2 M 1910 † Paul Berthelot, fondinto de gazeto "Esperanto".
3 M
4 Ĵ 1911 Unua Galicia E. Kongreso, Lvov.
5 V
6 S
7 D 1901 † W. Trompeter, germana pioniro.
1902 Parolado de J. L. Charlier kaj fondo de la grupo en Keighley.
8 L
9 M
10 M 1903 Dro Ad. Nicolas publikigas sian lingvon "Spokil".
1920 Fondo de Internacia Oficejo por Lernejoj "Plen-Aero".
11 Ĵ 1884 Parolado de L. Einstein pri historio de mondlingvo, en Nürnberg.
1899 E. kurso gvidata de Prof. Louvet en Lille.
1920 Komerca Asocio de Rio de Janeiro aprobas Eon.
12 V 1903 Milita Ministro de Francujo cirkulere permesas al oficiroj aliĝi al E. societoj.
13 S
14 D 1716 † Leibniz, glora filosofo, fama matematikisto, mondlingvisto.
15 L 1670 † Jan Komensky, fama pedagogo (Comenius), mondlingvano.
1837 Unua libro de la stenografio de I. Pitman.
1920 Unua ĝenerala kunveno de la Ligo de Nacioj.
16 M
17 M 1901 Parolado de Dumont, Annecy.
18 Ĵ
19 V 1921 Tria Internacia Labor-Konferenco aprobas Eon, Genève.
20 S 1629 Letero, pri artefarinda helplingvo, skribita de Descartes al pastro Mersennes.
21 D 1694 * Voltaire, fama verkisto, mondlingvano.
22 L 1901 E. kurso de Prof. H. Boucon, Annecy.
23 M
24 M 1907 Fondo de Ĉila E. Asocio.
25 Ĵ
26 V 1903 Parolado de Prof. Ch. Lambert. Gand.

27 S 1895 Testamento de A. Nobel pri premiado de eminentuloj.
28 D 1903 Parolado de Prof. Ch. Lambert, Bruxelles.
29 L 1866 † Aimé Paris, fama franca stenografo.
1913 Fondo de Internacia Skerma Federacio, Paris.
30 M 1903 Parolado de Prof. Ch. Lambert, Anvers.

Decembro. XII-a monato.

(La vorto "Decembro" devenas el latina "decem" dek, kaj tin monato estis vere la deka ĉe Romanoj, kiuj komencis la jaron per Marto. Decembro estas unua monato de vintro por Norda Duonglobo, kaj de somero por Suda Duonglobo.)

1 M 1902 Fondo de Svisa E. Societo.
1906 Fondo de Sveda E. Societo.
1909 † Dro VALIENNE, verkinto de du E. romanoj.
1922 Fondo de Internacia Fervoja Unio, Paris.
2 Ĵ 1921 Finna Parlamento fiksas subvencion al E., pagotan el la buĝeto.
3 V 1903 Fondo de E. Societo en Vera Cruz, Meksiko.
4 S 1901 E. kurso gvidata de LAKEYRE, Valence, Francuja.
5 D
6 L 1823 * MAX MÜLLER, fama lingvisto, kiu aprobis Eon.
1917 Fondo de Internacia Amerika Oficejo por protekto de fabrikmarkoj, Habana.
7 M 1924 † KLARA ZAMENHOF, edzino de nia majstro.
8 M 1922 Unua Brita disradiigo en E., London.
9 Ĵ 1902 Unua ĉeha E. Klubo fondita en Praha.
1907 Fondo de Internacia Oficejo de Publika Higieno, Paris.
10 V 1911 Itala Reĝo aŭdience akceptas Son EDMOND PRIVAT, kin klarigas celon de nia movado.
11 S 1799 Enkonduko de la Metra Sistemo, en Francujo.
1851 * M. DEWEY, kreinto de Universala Decimala Bibliografio.
1895 Fondo de Internacia Asocio de kuiristoj, Frankfurt a. M.
12 D 1897 Parolado de Prof. E. ROUX, Grenoble.
13 L 1920 La Ligo de Nacioj kreas Konstantan Kortumon de Internacia Justeco.
14 M
15 M 1859 * L. L. ZAMENHOF naskita en Belostok.
16 Ĵ 1920 Komisiono de la Ligo de Nacioj decidas ke estu ekzamenata stato de E. movado, Genève.
17 V 1878 L. ZAMENHOF festas kun la samklasanoj sian "lingwe uniwersala".
18 S 1920 E. prdisikutata en la Ligo de Nacioj, Genève.
19 D
20 L 1920 Bulgara Ministro de Instruado rekomendas Eon.
21 M 1903 Parolado de G. AKTARĜIEV, Sofia.
22 M 1903 Parolado de Prof. SAINT-LOUP, Besançon.
23 Ĵ 1865 "Latina Mona Unio" inter Francujo, Svislando, Italio, Belgio kaj Greklando.

24 V 1897 Parolado de kapitano CH. LEMAIRE, en Bruxelles.
25 S
26 D 1911 † G. ROBIN, rumana pioniro.
27 L 1876 Fondo de Unueciga Stenografa Asocio, Paris.
28 M 1900 Fondo de E. grupo en Samoëns, Haute Savoie.
29 M
30 Ĵ 1922 Fondo de Universala Asocio por memvola senarmiĝo, Wien.
31 V Lasta tago de l' jaro.

LEONARD RUDNICZEWSKI

UNUA PARTO

ESPERANTISMO

Organizo de la Esperanto-Movado
Institucioj, Gazetoj, Fakaj unuiĝoj
Listo laŭlanda de lokoj kun Delegitoj
de UEA

STATO JE LA 15 JANUARO 1926

LEONARD RUDNICZEWSKI

Notindaj datoj el la historio de Esperanto kaj de UEA.

1859. ZAMENHOF, LAZARO LUDOVIKO, naskiĝas en Bialystok (15. Decembro).
1878. ZAMENHOF festas kun siaj kunlernantoj la efektivigon de la "Lingvo Universala".
1887. Apero de la broŝuro "Dro Esperanto, Lingvo Internacia".
1889. Apero de la unua gazeto en E.: "La Esperantisto" en Nürnberg.
1892. Fondo de Societo "Espero" en Peterburgo (Leningrad).
1898. Fondo de la Franca Societo por la Propagando de Esperanto.
1899. La raporto "La lingvo Internacia" de E. NAVILLE estas prezentata al la Akademio Franca de la Sciencoj.
1901. Generalo SEBERT kaj CH. MÉRAY prezentas Esperanton al la Franca Akademio de la Sciencoj.
1903. Fondo de "Juna Esperantisto" de H. HODLER kaj EDM. PRIVAT.
1903. Fondo de la Hispana Societo por la Propagando de Esperanto.
Fondo de la Brita Esperantista Asocio.
1905. Unua kongreso de Esperanto en Boulogne sur Mer. Akcepto de la deklaro pri Esperantismo. Elekto de la Lingva Komitato. (L. K.)
1906. Fondo de la Germana Esperanto Societo en Braunschweig.
Dua kongreso de Esperanto en Genève. Aprobo de la propono de A. CARLES pri kreo de "konsuloj".
1907. Esperanto, gazeto de UEA reaperas sub gvidado de H. HODLER.
TH. ROUSSEAU instigas la kreon de Esperanto-Oficejoj.
Tria kongreso de Esperanto en Cambridge.
1908. Oficiala fondo de UEA (Majo); provizora elekto de Delegitoj.
Kvara kongreso de Esperanto en Dresden.
Unua kunsido de UEA dum la kvara kongreso.
1909. Kvina kongreso de Esperanto en Barcelona.
Dua kunsido de UEA dum la kvina kongreso.
1910. Unua kongreso de UEA en Augsburg.
Sesa kongreso de Esperanto en Washington.
1911. Sepa kongreso de Esperanto en Antwerpen (Anvers).
Dua kongreso de UEA.
1912. Oka kongreso de Esperanto en Kraków.
Tria kongreso de UEA en Kraków. Financa reformo de UEA.
1913. Naŭa kongreso de Esperanto kaj Kvara de UEA en Bern.

1914. Deka kongreso de Esperanto kaj Kvina de UEA en Paris.
1915. Dekunua kongreso de Esperanto en San Francisco.
1916. Morto de HAROLD BOLINGBROKE MUDIE, prezidanto de UEA (6. Jan.).
Morto de TH. ROUSSEAU, vicprezidanto de UEA (11. Aprilo).
1917. Morto de Dro L. L. ZAMENHOF en Warszawa (14. Aprilo).
Morto de Rektoro BOIRAC, prez. de la Esp. Akademio (20. Decembro).
1920. Morto de HECTOR HODLER, prezidanto de UEA (30. Marto).
Dekdua kongreso de Esperanto kaj Sesa de UEA en Hago.
1921. Rezolucio de la Xa Internacia konferenco de la Ruĝa Kruco en Genève, instiganta la lernadon de Esperanto inter Ruĝkrucaj organizaĵoj.
Dektria kongreso de Esperanto kaj Sepa de UEA en Praha.
Rezolucio subtenita de 13 ŝtatoj ĉe la dua kunveno de la Ligo de Nacioj, favore de instruado de Esperanto en la lernejoj.
1922. Pedagogia konferenco pri Esperanto en Genève.
Dekkvara kongreso de Esperanto kaj Oka de UEA en Helsinki.
Decido de l'kongreso pri Oficiala Organizo Esperantista.
Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj; raporto de la sekretariaro de la L. d. N. al la tria kunveno.
1923. Komerca kaj turisma konferenco pri Esperanto en Venezia.
XVa kongreso de Esperanto en Nürnberg, UEA oficiala organizaĵo esperantista. — Morto de Dro A. MYBS, honora membro de UEA, hon. prez. de GEA kaj akademiano. — Morto de kolonelo POLLEN, honora prezidanto de BEA, Garantianto de UEA. — Morto de Prelato A. GIESSWEIN, prez. de Hungar. Esp. Societo.
1924. Rekomendo de la Ligo de Nacioj al la ŝtatmembroj trakti Esperanton kiel klaran lingvon en telegrafado.
XVIa kongreso en Vieno. — Memortabulo ĉe Hotelo Hammerand.
Morto de Sino Klara Zamenhof, vidvino de la majstro (7. Decembro).
1925. XVIIa kongreso de Esperanto kaj somera Universitato en Genève.
Esperanto klara lingvo en telegrafado.
Rezolucioj ĉe Paca kongreso en Paris; kongreso de Teknika Gazetaro, Trade Unions. Poŝtmarko kun teksto en Esperanto.
1926. Konferenco en Locarno. Inaŭguro de Zamenhofa Monumento.
XVIIIa kongreso de Esperanto kaj Somera Universitato en Edinburgh.

La Esperanto-Kongresoj.

*** Unua Internacia Renkonto en Calais—Dover.
1904, 7.—8. VIII. Prezidis kapitano CAPÉ-MONTROSIER.
180 anoj el 6 landoj. Rezolucioj: Unua kongreso en Boulogne, ĉiujaraj kongresoj, esperantista signo, elparolo.

I. Unua Kongreso en Bulonjo (Boulogne-sur-Mer).
1905, 7.—12. VIII. Prezidis Dro ZAMENHOF kaj BOIRAC.
688 anoj el 20 landoj. Rezolucioj: Deklaracio pri Esperantismo, Fundamento, Lingva Komitato (95 anoj de 19 lingvoj), Esperantista flago, propono de A. Carles pri "konsulejoj" (embrio de UEA). Parolado de Zamenhof pri historia graveco de la unua kongreso.

II. Dua Kongreso en Ĝenevo (Genève).
1906, 28. VIII. — 1. IX. Prezidis FRIEDRICH SCHNEEBERGER.
1200 anoj el 30 landoj. Rezolucioj: Aprobo de la kreo de "konsuloj", Konstanta Kongresa Komitato, Neŭtraleco de la kongresoj. Fakaj kunsidoj unuafoje organizitaj. Parolado de Zamenhof pri la interna frateca ideo. — Fondo de Internacia Scienca Asocio Esperantista.

III. Tria Kongreso en Kembriĝo (Cambridge).
1907, 12.—17. VIII. Prezidis KOLONELO POLLEN.
1317 anoj el 35 landoj. Rezolucioj: Spesmila sistemo (help-mono) Regno (Belgio) unuafoje reprezentita. Parolado de Zamenhof pri la spirito de la kongresoj.

IV. Kvara Kongreso en Dresdeno (Dresden).
1908, 17.—22. VIII. Prezidis Dro MYBS.
1500 anoj el 40 landoj. 7 reprezentantoj de registaroj kaj oficialaj institucioj. Rezolucioj: Internacia Instituto de Esperanto. Evolua sistemo. Parolado de Zamenhof pri la unua periodo de Esperanto kaj pri la reformoj.

V. Kvina Kongreso en Barcelono (Barcelona).
1909, 6.—11. IX. Prezidis F. PUJULA Y VALLÈS.
1300 anoj el 32 landoj. 19 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Internacia Organizo de Naciaj Societoj. Parolado de Zamenhof pri la malfacilaĵoj de la laboro.

VI. Sesa Kongreso en Vaŝingtono (Washington).
1910, 15.—20. VIII. Prezidis J. BARRETT.
357 anoj el 20 landoj. 16 oficialaj reperzentantoj. Rezolucioj: Internacia Konsilantaro akceptita. Parolado de Zamenhof pri evoluo kaj estonteco de Esperanto.

VII. Sepa Kongreso en Antverpeno (Anvers).
1911, 20.—27. VIII. Prezidis A. VAN DER BIEST.
1800 anoj el 42 landoj. 26 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Rajtigitaj delegitoj. Parolado de Zamenhof pri la neceso organiziĝi.

VIII. Oka Kongreso en Krakovo (Kraków).
1912, 11.—18. VIII. Prezidis Dro MIKOLAJSKI.
1000 anoj el 28 landoj. 11 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Kongresa Regularo. Lasta Kongresa parolado de Zamenhof pri la konkordo. 25a jubileo de Esperanto.

IX. Naŭa Kongreso en Berno (Bern).
1913, 24.— 31. VIII. Prezidis JAKOB SCHMID.
1203 anoj el 30 landoj. 16 oficialaj reprezentantoj. Malferma parolado de R. de Saussure pri la principoj de la organizo esperantista. Rezolucioj: Fido al la Lingva Komitato, kunakordiĝo de la oficialaj organizaĵoj. Neceso de la nacia kunagado.

X. Deka Kongreso en Parizo (Paris).
1914, 2. VIII. Ne okazis pro la militdeklaro. Aliĝis 3739 anoj el 50 landoj.

XI. Dekunua Kongreso en San-Francisko (San Francisco).
1915, 22.—29. VIII. Prezidis R. COLQUHOUN.
163 anoj el 16 landoj. 17 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Propagando en Universitatoj, danko al Sro D. Parrish kaj Kalifornia esperantistaro.

*** Postmilita Konferenco en Parizo (Paris).
1919, 21.—25. IX. Prezidis ROLLET DE L'ISLE.
26 anoj el 3 landoj. Rezolucioj: Denova aranĝado de la ĉiujaraj kongresoj. Rajtigitaj delegitoj.

XII. Dekdua Kongreso en Hago ('s-Gravenhage).
1920, 9.—15. VIII. Prezidis J. R. ISBRÜCKER.
408 anoj el 27 landoj. 7 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Neceso de laboro por teknikaj vortaroj. Parolado de Dro PRIVAT pri la internacia solidareco.

XIII. Dektria Kongreso en Praha.
1921, 31. VII. — 6. VIII. Prezidis S. KAMARYT.
2561 anoj el 35 landoj. 30 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Neceso de la centra organizo. Parolado de Dro PRIVAT pri la nacia kaj internacia kulturo.

XIV. Dekkvara Kongreso en Helsinki.
1922, 9.—15. VIII. Prezidis VON FRENCKELL.
850 anoj el 30 landoj. 14 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Kontrakto de la internacia organizo de la Esperanto-Movado. Parolado de Dro PRIVAT pri Esperanta Kulturo.

XV. Dekkvina Kongreso en Nürnberg.
1923, 2.—8. VIII. Prezidis Dro J. DIETTERLE.
4963 anoj. 12 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Aprobo de la monkolekto por la Zamenhofa monumento. Konfirmo de la Kontrakto de Helsinki; Rekono de UEA kiel oficiala organizaĵo.

XVI. Deksesa Kongreso en Vieno (Wien).
1924. 6.—14. VIII. Prezidis Dro MINIBECK.
3400 anoj. 8 oficialaj reprezentantoj. Rezolucioj: Kongresa Regularo. Lingva Disciplino. Parolado de Dro PRIVAT pri la kultura rolo de Esperantistaro.

XVII. Deksepa Kongreso en Ĝenevo (Genève).
1925, 2.—6. VIII. Prezidis Dro E. PRIVAT.
953 anoj el 35 landoj. 38 oficialaj reprezentantoj.
Prelegoj en la unua Somera Universitato. Zamenhofa memor-festo. Rezolucioj: Aprobo de la monkolekto por la Zamenhofa monumento, aprobo de la seria libro-eldono de Mosse. Teatra prezentado de "Ginevra". Parolado de Sino MORRIS. Parolado de Dro PRIVAT pri Zamenhofaj idealoj.

XVIII. Dekoka Kongreso en Edinburgo (Edinburgh).
1926, 1.—7. VIII. Internacia Somera Universitato.

Pioniroj de la Esperantismo.

L. L. Zamenhof kaj K. S. Zamenhof. La kreinto de nia lingvo naskiĝis la 15an de dec. 1859 en pola urbo Belostok (Bialystok), Grodna gubernio, tiama Ruslando. En 1869 li eklernis en la urba liceo. En 1874 li studas en "klasika gimnazio" de Varsovio, kien translogis la familio. En 1878 Z. prezentas al la kamaradoj sian unuan provon "lingwe universala", el kiu poste iĝis "lingvo internacia", publikita en 1887. En 1885 Z. ricevis kuracistan diplomon, post du jaroj li edziĝis je Fino Klara Silbernik. Serĉante la klientaron Z. loĝis en provincaj urbetoj, tre modeste, malriĉe, ĝis en 1890 la geedzoj revenis Varsovion. Parton de sia vivo Z. oferis al Esperanto, la alian parton li dividis

inter la vivgajna profesio kaj la bonfarado. Multaj centoj da malriĉuloj senpage ricevis kuracan helpon de Z., kaj tiurilate li estis en Varsovio pli konata, ol kiel aŭtoro de la mondlingvo. Lia projekto de universala religio "homaranismo", kaj liaj klopodoj por la paco, formas kune kun la Esperantismo unu harmonian tuton. La milito dolorigis nian majstron, jam delonge malsanetan je la koro, kaj li forpasis la 14an de apr. 1917 en Varsovio. Lia fidela edzino sekvis lin la 5an de dec. 1924. En "Vivo de Zamenhof" de Dro Privat la leganto trovos detalojn pri la vivo de Z.

Berthelot. Paul Berthelot (1883—1910) esperantiĝis en 1898, kunlaboris en esp. gazetoj, vortaroj. Pro la sano forlasis Parizon kaj iris al Pireneoj, poste al Brazilo kie li mortis juna. Neniam forgesebla, ĉar li fondis en 1905 la gazeton "Esperanto", kiun poste daŭrigis Hodler.

Bicknell. Clarence Bicknell (1842—1918) devenis el riĉa angla artama familio, edukiĝis en Cambridge, pastriĝis, kaj ekspastriĝis en 1878 en *Bordighera*, itala urbeto, kie li por ĉiam fiksiĝis. Li science esploris kreskaĵojn kaj prehistoriaĵojn, pri kiuj li verkis anglalingve. En 1899 B. aliĝis Eon kaj poste multe tradukis proze kaj verse.

Bourlet. Carlo Bourlet (1866—1913), konata matematikisto, talenta profesoro, aŭtoro de klasikaj francaj lernolibroj de matematiko. Esperantiĝis 1900 dank' al Méray. En 1901 komencis viglan propagandon per artikoloj, broŝuroj, paroladoj, kursoj. Enkondukis Eon ĉe la Touring-klubo, Librejo Hachette. Fondis "La Revuon", kiu presigis (1906—1914) valorajn verkojn de Zamenhof, kiu diris ĉe lia tombo: "Oni multe laboris por E. ankaŭ antaŭ Bourlet, sed de la momento, kiam li aliĝis al nia anaro, en nian aferon enverŝiĝis nova energio. Al lia senlaca iniciatado, instigado, helpado ni ŝuldas grandan riĉiĝon de nia literaturo kaj aperon de plej gravaj verkoj pri kaj en nia lingvo, al lia iniciato kaj energia laborado ni ŝuldas la fondiĝon de gravaj institucioj, kiel ekzemple la Internacia Scienca Asocio . . ."

Boirac. Émile Boirac (1851—1917), konata franca profesoro, rektoro de Diĵona Universitato, aŭtoro de verkoj pri psikologio, filozofio, neopsikismo. Esperantiĝis 1900. Unua prezidinto de la Akademio kaj de la Lingva komitato. Aŭtoro de la unua "Plena Esp.-

Esp. Vortaro". Prezidinto de la Unua Kongreso. Membro de la estinta Delegacio, kie li forte defendis nian lingvon. Tradukis: "Monadologio" de Leibniz, "Kvara Majo", "Don Juan". Dum multaj jaroj ne nur per siaj grandaj laboroj, ankaŭ per sia aŭtoritata nomo li kontribuis al plifirmigo de Esperantismo. Li estas unu el plej bonaj stilistoj kaj spertuloj en nia lingvo.

Capé-Montrosier (?—1916), milita kapitano, kavaliro de Honora Legio, fondinto de "Tra la Mondo" kaj "Alĝeria Stelo". LK ano (1907—1914). Lia gazeto Tra la Mondo estis unua esperantista ilustrita revuo. Li mortis en batalo ĉe Verdun.

Codorniu. Ricardo Codorniu (1846—1923), arbara inĝeniero en Murcia, poste en Madrid. Esperantistiĝis 1900. Lingva-komitatano 1905, reelektita 1914. Aŭtoro de hispanlingva verketo pri Sotos Ochando, malnova mondlingvisto.

Cox. Majoro George Cox (1838—1909), esperantisto depost 1905, aŭtoro de "Grammar and Commentary on the E.", multe tradukis el la Biblio, Mil-kaj-Unu Noktoj, k. a. Vic-prezidinto de Brita Esp. Asocio.

Dor. Henri Dor (1835—1912), doktoro-okulisto, konata eŭropa oftalmologo, profesoro en Lyon kaj honora profesoro de Berna Universitato. Esperantistiĝis 1902, fondis samjare la grupon en Lyon, fondis kaj prezidis TEKA. Li estis la "patriarko" de la "dua generacio" de Esperantistoj.

Elb. Leopold Elb (?—1912). Lingva-komitatano depost 1909, li entreprenis grandan kompilan kaj revizian laboron super la komuna vortaro, sed tro frua morto lin forrabis el nia rondo.

Leopold Einstein (1834—1890) estis konata volapükisto en Nürnberg kiam aperis unua libro de Esperanto. Entuziasma pro la supereco de la nova lingvo, E. kune kun tuta Nürnberga Volapüka klubo aliĝis al Esperanto kaj komencis ĝin propagandi per paroladoj, artikoloj, broŝuroj. Tio estis grava apogo de nia komencanta movado.

Fauvart-Bastoul. Komandanto Fauvart-Bastoul (1845—1922) apartenis al fama Dijon-a grupo, helpis al Boirac por lia "Plena Vortaro". Publikigis en 1909 gravan verkon: Ŝlosilvortoj, 160-paĝan studon por uzo de francoj. Lingva-komitatano depost 1911. En 1904 eldonis, kun sia edzino Marcelle kaj frato Louis, literaturaĵon "Triope".

Grabowski. Antoni Grabowski naskiĝis la 11an de Marto 1857 en Nowedobro ĉe Vistulo, Polujo. En Universitato de Breslau li ricevis diplomon de kemia inĝeniero. Li lernis nian lingvon en 1887, kaj en 1888 li vizitis nian majstron, kiu havis plezuron paroli kun sia unua parolanta disĉiplo. Jam en la 1888 Grabowski tradukas kaj publikigas "Neĝa Blovado", novelon de Puŝkin. Li multe tradukis kaj originale verkis versaĵojn. Liaj ĉefaj verkoj: "La Liro", "Nova Antologio", "El Parnaso de Popoloj", "Sinjoro Tadeo". Lingva-komitatano depost 1905, Akademiano depost 1908. Ii estis fine direktoro de la gramatika sekcio. Grabowski estis, post la majstro, unua stilisto kaj patro de Esperanta poezio. Kelkaj el liaj versaĵoj troviĝas en la Fundamento Krestomatio. Li forpasis la 3an de Julio 1921.

Hodler. Hector Hodler (1887—1920), filo de Ferdinand Hodler, svisa pentristo, samurbano kaj lerneja kamarado de Dro Privat. En 1903 ili, ambaŭ liceanoj, eklernis Esperanton, tuj fondis klubon kaj gazeton "Juna Esperantisto". Dediĉinte sin, post la liceo, tute al Esperantisto, Hodler realigis kaj perfektigis projekton de Rousseau kaj Carles pri la konsuloj Esperantistaj. Tiel kreiĝis UEA, al kiu Hodler testamentis parton de sia havaĵo kiel sian lastan, postmortan, oferon al la kara afero. Krom la organiza kaj gazeta laboro, Hodler studis ĝeneralajn sociajn problemojn, lastatempe kaŭzojn de la milito. Hodler estis modesta, neprofitema, laborema viro. Li majstris la lingvon, kaj ankoraŭ knabo li tradukis klasikan verkon "Paŭlo kaj Virginio", eldonitan 1905 de la Presa Esperantista Societo. El tiu ĉarma libreto ni tiras jenajn vortojn, per kiuj ni volas karakterizi Hodler:

... dum juneco vi havis prudenton de saĝulo ...

Höveler. Herbert F. Höveler (1859—1918), kemia-metala industriisto, germano britiĝinta; esperantiĝis 1904. Lia pseŭdonomo Ĉefeĉ transiris al de li elpensitaj "Ŝlosiloj", eldonitaj en 20 lingvoj, depost 1905. Fondis Ĉekbankon Esperantistan kiu faris servon per

siaj transpagiloj kaj ĉekoj tempo- kaj mon-ŝparaj. LK ano 1909. Aŭtoro de bonega studo: Elementoj kaj Vortfarado, de Tutmonda anekdotaro, kaj de traduko: Kio povas okazi... Akademiano 1912, li interalie fondis plurajn grupojn en ekstereŭropaj landoj. Malavara garantiinto kaj vic-prezidinto de Brita Esp. Asocio.

Huet. Horace Huet (?—1911). Esperantisto de l'frua tempo. Fondis la grupon en Nice 1901. Lingva-komitatano, laboris pri la kompletigo de la Universala Vortaro.

Javal. Émile Javal (1839—1907), membro de Franca Akademio Medicina, honora direktoro de Oftalmologia Laboratorio en Parizo. Doktoro-okulisto li mem blindiĝis en 1900, kaj verkis "Inter Blinduloj" valoran libron, kiun esperantigis lia bofilino. Li testamentis por nia afero kapitalon, kiu servis al la Centra Oficejo en Parizo. Zamenhof estis lia gasto dum sia unua vizito al Parizo. Li sin mem trajtis per jena parolo biblia: "Mi ĝojis pri mia laboro, kaj nenion plu mi akiris el mia laboro."

Ladevèze. René de L. (1885—1913), komercisto, loĝis en Anglujo, Germanujo, mortis en Marseille. Verkis bonegan libron: Demandaro pri Esperanto kaj kunlaboris ĉe tradukado en E. de Kodo Lugagne.

Méray. Charles Méray (?—1911) fama matematikisto. Inter 1900 kaj 1905 favorigis nian lingvon per sia alta aŭtoritato, kiu altiris al E. multajn scienculojn, interalie la Dijon-anojn.

Meyer. Samuel Meyer (1864—1921), naskiĝis, vivis kaj mortis en franca havenurbo La Rochelle, kie li estis ŝipmakleristo. Jam en 1899 lia nomo aperas en niaj gazetoj. En 1905 lingva-komitatano, reelektita en 1914. Dum Beaufront-a periodo li kunlaboris en "L'Espérantiste". Lia ĉefa heredaĵo estas serio da literaturaj tradukoj: Vojaĝo interne de mia ĉambro, Barbiro de Sevilla, Karmen, Avarulo, Estu homo.

Moscheles. Felix Moscheles (1833—1917), londona pentristo, el riĉa familio, parenco de fama komponisto Mendelssohn, amiko de Mazzini, Schumann, Richard Wagner, Sarasate, Irving, Stead, Kropotkin, Stepniak. Esperantistiĝis sepdekjara kaj helpis nian movadon. Honore elektita ĿKano, li eksiĝis 1914. Li ŝatis nian lingvon pro ĝia paciga rolo.

Motteau. Achille Motteau (? — 1906), franco angliĝinta. Volapükisto, esperantisto 1901. Aŭtoro de esp.-anglaj vortaroj. Tradukis "La Ventego" de Shakespeare. Fondis 1903 Esp. grupon en Forest Gate.

Mudie. Harold Bolingbroke Mudie (1880—1916), aliĝis al E. en 1902, kaj baldaŭ fondis "The Esperantist", kiu poste fandiĝis kun "The British Esp.". Prezidinto de la Brita kaj de la Universala Esperanto-Asocio. Partopreninto de preskaŭ ĉiuj Kongresoj, bona organizinto kaj senpartia gvidinto. Li mortis pro aŭtomobila akcidento, en Francujo.

Mybs. Eduard Mybs (1857—1923), kuracisto-doktoro, unue volapükisto; esperantisto 1903. Fondis plurajn grupojn kaj societojn en Germanio. Prezidinto de GEA, Lingva-komitatano 1905, Akademiano 1908, reelektita 1914. Honora Membro de UEA.

Noël. Eugène Noël (1855—1921). Laborema tradukinto de klasikaĵoj: Rolandkanto, Ĉielo kaj Tero de Byron, Athalie, Esther de Racine, Plutos de Aristophanes, En lando de la Blanka Monto, k. a.

Pollen. John Pollen (1848—1923), kolonelo, oficinta en Hindio, Petrogrado, k. a. Prezidinto de Brita Esp. Asocio, partopreninto de ĉiuj kongresoj, lerta propagandisto kaj bonhumora ano de la societoj, kiujn li vigligis kaj apogis. Akcidente mortiĝis ĉe la marbordo.

Rhodes. Joseph Rhodes (1856—1920), angla pioniro, naskiĝis, vivis kaj mortis en Keighley, urbeto de Yorkshire. Ĵurnalisto, fine komizo, li trovis en E. sferon por sia spirita agado. Aŭtoro de unua

detala angla-esp. vortaro, fondinto 1902 de la loka Esp. Societo. Lingva-komitatano 1905—1914. (Detaloj: "Joseph Rhodes kaj la fruaj tagoj de Esperanto en Anglujo", verko de J. Merchant).

Richardson. Austin Richardson (1847—1913), pastro, anglo, longe loĝis en Bruselo, prezidinto de la Katol. Esp. Societo; mortis en Bossey, Svislando, survoje al la Berna Kongreso.

Rousseau. Théophile Rousseau (1876—1916), licea profesoro de matematiko en Dijon. Esperantiĝis 1905. Li iniciatis "Esperanto-oficejojn", kiel Carles la "konsulojn", kaj el tiuj provoj naskiĝis UEA. Multe kunlaboris al la gazeto "Esperanto", per fundaj bone pripensitaj artikoloj pri ĝeneralaj interesoj de la movado kaj speciale de UEA. Iniciatis gvidlibrojn kaj turisman organizon pere de E. Li mortis sur la batalkampo ĉe Verdun.

Ŝĉavinski. Timofei Ŝĉavinski (1868—1922) esperantisto de l'unua epoko, aŭtoro de la plej vasta kaj detala rus-esp. lernolibro. Loĝis en Melitopol, fine en Petrogrado. Multe tradukis kaj verkis originale. Redaktis literat. almanakon "Verda Radio", kaj humoran gazeton "Feĉo" kiu ĉesis pro la revolucio.

Skeel-Giörling. Frederik de Skeel-Giörling (1877—1910), pioniro de dana movado, depost 1900. Aŭtoro de esp.-dan-norvega vortaro. Lingva-komitatano 1905. Tradukis: Fabeloj de Andersen, En harmonio kun la eterneco.

W. H. Trompeter (1838—1901), unuaperioda germana pioniro en Vestfalio, helpis nian majstron en la malfacila momento, kiam "La Esperantisto", sola gazeto en nia lingvo, ne plu povis aperi. El siaj propraj monrimedoj li daŭrigis la gazeton dum 3 jaroj, ĝis 1894. Prave oni diris ke la historio de nia movado estus alia, se la du germanaj pioniroj (Einstein, Trompeter) ne apogus ĝin siatempe, kiam ĝia forto dependis de l'agado de izolaj sindonemuloj.

Valienne (1854—1909), kuracisto-doktoro; lernis E-on dum tempo de longa malsano, kiu donis al li liberajn horojn. Estis li, unua, kiu verkis originalajn romanojn: "Ĉu li?" kaj "Kastelo de Prelongo". Li tradukis: Eneido, Manon Lescaut, Paco kaj Milito, Metamorfozoj de Ovidio, Aventuroj de Telemako (du lastaj nepresitaj).

Wackrill. Alfred Wackrill (1862—1924), inĝeniero en London, Akademiano 1908. Aŭtoro de la "Konkordanco al la Ekzercaro", tradukinto de "Venecia Komercisto", "Ok Noveloj" de Bennett, kelkaj partoj de la Biblio.

Zakrzewski. Adam Zakrzewski (1856—1921) estis konata pola scienculo, kiu multe laboris por nia afero. Li publikigis pli ol 15 verkojn kaj pli ol 45 artikolojn pri kaj en Esperanto. Ĉefa inter ili estas ilustrita kaj dokumentita "Historio de Esperanto", la plej vasta el tiu speco. Lingva-komitatano, li multe kontribuis al la lingvostudoj, kaj modeste ne akceptis kandidatecon ĉe la Akademio. Lia unua poresperanta artikolo aperis en "Kurjer Polski" 1903, sed jam en 1885 li skribis pri la lingvo universala en varsovia gazeto "Wedrowiec".

Ĉefaj okazintaĵoj de la jaro 1925.

* La XVII[a] UNIVERSALA KONGRESO okazis en Genève, de 31[a] Julio ĝis 6[a] de Aŭgusto. Partoprenis 900 anoj, el kiuj 80% estis nesvisaj fremdlandanoj.

* Apud la Kongreso funkcis SOMERA UNIVESITATO, en kiu prelegis dek fakuloj, kaj vizitis 300 studantoj.

* Du INTERNACIAJ KONFERENCOJ, pri uzado de Esperanto en sciencoj kaj en komerco, okazis en Paris, 14—17 Majo.

* Unua Kongreso de RADIO-AMATOROJ, en Paris, 15—17 Aprilo, adoptis Esperanton kiel sian helpan lingvon, uzotan apud la naciaj lingvoj.

* Jenaj NACIAJ kaj FAKAJ (*) kongresoj okazis dum la jaro:

Aŭstria V[a] en Salzburg, Aŭgusto 9—11.
Belga XIV[a] en Verviers, Majo 31 ĝis Junio 2.
Brita XIV[a] en Leamington, Majo 31 ĝis Junio 2.
Bulgara XII[a] en Sofia, Julio 9—12.
Dana, en Odense, Majo 31 ĝis Junio 1.
Franca, en Clermont-Ferrand, Majo 31 ĝis Junio 2.
Germana XIV[a] en Magdeburg, Majo 31 ĝis Junio 1.

Hispana (Iberia) III[a] en Córdoba, Majo 10—12.
Hungara VII[a] en Budapest, Majo 30 ĝis Junio 1.
Itala X[a] en Bari, Septembro 13—15.
Japana XIII[a] en Kioto, Oktobro 16—18.
Japana III[a] Kiuŝua, en Beppo, Marto 21—22.
Kataluna X[a] en Palma, Majo 21—24.
* Katolika X[a] en Paris, Aŭgusto 13—16.
Nederlanda I[a] en Hilversum, Majo 30 ĝis Junio 1.
Nord-Amerika XVII[a] en Cleveland, Julio 8—12.
Pariz-regiona en Versailles, Aprilo 26.
Pola VI[a] en Warszawa, Majo 30 ĝis Junio 1.
Rumana V[a] en Ploesti, Julio 25—27.
Rusa V[a] en Moskva, Aŭgusto 5—10.
* Sennacia V[a] en Wien, Aŭgusto 11—15.
Skota XX[a] en Largs, Junio 5—7.
Sveda Laborista en Uddevalla, Julio 11—12.
Svisa kunveno en Biel, Oktobro 11.

* La monumento al Zamenhof estis starigita sur la tombon la 18[an] de Januaro, en Warszawa.

* La Lingva Komitato elektis 5 pluajn anojn: S[roj]n Behrendt, Kastner, Lajarte, Tellini kaj F[ino]n Zschepank. La Akademio akceptis en sian anaron jenajn lingva-komitatanojn: S[roj]n Bailey, Isbrücker, Migliorini.

* La Bahaista Movado estis unuafoje oficiale reprezentita dum la Universala Kongreso, laŭ la ordono de ĝia spirita ĉefo:

* Internacia Policteknika Ekspozicio, en Karlsruhe — Junio 7—24 — akceptis Esperanton kiel la help. lingvon, kaj presigis en ĝi siajn informilojn.

* Granda Nacia Enciklopedio "Enciklopedia Espasa" en Madrid aldonis al la naciaj lingvoj, tradukon de la vortoj en Esperanto.

* Internaciaj Floraj Ludoj (XI) okazis en Palma de Mallorca, apud la Kataluna Kongreso, la 23[an] de Majo, en "Teatro Principal". La naturan floron gajnis S[ro] A. Domènech, la reĝino de la festo estis proklamita F[ino] C. Montaner. El 111 alsenditaj verkoj estis premiitaj 50.

* La propaganda sekretario de la Internacia Centra Komitato, S[ro] Andreo Ĉe, faris propagandan vizitadon al la societoj kaj grupoj de Ĉeĥoslovakio, Germanio, Francio, Svislando, Britlando.

* La Oomoto-movado estis oficiale reprezentita de S[ro] K. Niŝimura, kiu fondis eŭropajn filiojn de la Oomoto pere de nia lingvo.

* La Internacia Labor-Oficejo daŭris eldoni en nia lingvo sian bultenon ĉe la gazeto "Esperanto".

* Originalaj verkoj en Esperanto komencas esti tradukataj nacie, ekzemple: "Ĉu li?" de Valienne (france) "Abismoj" de Forges (finne), "Pri ideala nutraĵo" (ĉehe) ktp.

* La Instituto "Linguaphone" eldonis en Esperanto serion da diskoj kun divers-temaj pecoj, surparolitaj de Sro Edmond Privat.

* La Internaciaj Foiroj daŭre uzis nian lingvon por siaj presaĵoj, ekz. la Foiroj de Leipzig, Frankfurt, Lyon, Reichenberg, Wien, Basel, Danzig, Breslaŭ.

* Unuaj oficialaj regnaj poŝtmarko kaj poŝtkarto kun Esperanta teksto estis eldonitaj en la Soveta Respubliko.



* Japana Parlamento, en la kunsido de la 8a Februaro, diskutis pri nia lingvo.

* Finna Parlamento subvencias la Esperanto-Instituton per 6000 Fmk.

* Estona Registaro subvencias per 12 000 est. markoj la gazeton de la Estona Esperantista Asocio.

* Multaj fakaj naciaj revuoj regule enhavis Esperanto-angulojn aŭ priesperantajn artikolojn, ekz. "Le Cuir", "Ateneo", "Revue de métrologie pratique", "Otavainen", "Eugenia", "Radio Revista", "Wireless Weekly", "Radio News", "Experimental Wireless", "Radio-Lubitelj", „Der Bund" (foira revuo de Frankfurt a. M.), "Revue Internationale de la Croix-Rouge", "Illustrierte Rundschau", "Ŝin Aiĉi", "L'Index des industries du Cuir", "El Heraldo Naturista", "Berliner Tagblatt", "Les dernières Nouvelles", ktp. ktp.

* Cionisma-Movado uzas nian lingvon per eldono de broŝuro pri Palestino.

* La Svisa Federala Fervojaro kaj Turisma Oficejo Svisa eldonis landkartojn kun Esperanta teksto. Turista karto 1 : 750 000 de la tuta Svislando. La Bern—Lötschberg—Simplon Fervojo eldonis panoraman reliefan karton de la Berna Oberlando.

* Tutmonda Polica Ligo eldonis en Esperanto sian Oficialan Almanakon, 1000-paĝan.

* "Deutsches Reichs-Adressbuch" eldonita de R. Mosse en Berlin uzas Esperanton por la registra var-listo.

* Internacia Kongreso de la Tekuika Gazetaro, en Paris, rekomendis uzadon de Esperanto.

* Internacia Kongreso de Spiritistoj, en Paris, rekomendis uzadon de Esperanto.

* Kongreso de Naturistoj-Vegetaranoj, en Bilbao, rekomendis uzadon de Esperanto.

* Kongreso de metallaboristoj, en Bilbao, rekomendis uzadon de Esperanto.

Grava eldonejo de lernolibroj por fremdaj lingvoj kaj vortaroj Toussaint-Langenscheidt en Berlin eldonis "Metoula" lingvo gvidilon, en Esperanto. "Metoula" estas tre disvastigita malmultekosta serio de konversaciaj libretoj. Jam pli frue alia konata eldonejo Groos en Heidelberg, eldonanto de lernolibroj Gaspey-Otto-Sauer kaj konversaciaj libroj Connor eldonis tian en Esperanto por germanlingvanoj.

* Kongreso de Universala Telegrafa Unio en Paris, septembro ĝis oktobro 1925 adoptis Esperanton kiel klaran lingvon por telegrafado.

Disvastigo de Esperanto inter la nacioj.

En suba listo troviĝas informoj pri la jaroj kaj lokoj de apero de la **unuaj** lernolibroj por la naciaj lingvoj.

jaro	lingvo	aŭtoro	urbo
1887	rusa	L. Zamenhof	Varsovio
1887	pola	L. Zamenhof	Varsovio
1887	franca	L. Zamenhof	Varsovio
1887	germana	L. Zamenhof	Varsovio
1888	angla	J. St.	Varsovio
1888	hebrea	Hanez	Varsovio
1888	judgermana	Hanez	Varsovio
1889	sveda	G. Henriclundquist	Varsovio
1889	latva	R. Libeks	Riga
1890	dana	C. Nielsen	Flensborg
1890	bulgara	M. Bogdanov	Sofia
1890	itala	D. Marignoni	Crema
1890	hispana	J. Rodriguez Huertas	Malaga
1890	ĉeĥa	F. Lorenc	Pardubice
1890	litova	A. Dabrauskas	Tilžeje

jaro	lingvo	aŭtoro	urbo
1892	portugala	J. H. Ferreira	Nürnberg
1896	holanda	J. Vaz Dias	Upsala
1898	hungara	A. Barabás	Kolszvár
1899	estona	H. Stahlberg	Tallinas
1901	kataluna	D. Andreu	Madrid
1902	flandra	A. Witteryck	Brugge
1906	finna	A. Lauren	Jakaja
1906	japana	Gauntlett	Tokio
1907	greka	A. Stamatiadis	Samos
1907	rutena	M. Jurkiev	Tarnopol
1907	araba	I. Muusbach	?
1908	rumana	G. Robin	Bucuresti
1908	serba	J. Jovanoviĉ	Kragujevac
1908	visaja	J. Galicano	Manila
1909	slovaka	A. Ŝkarvan	Chicago
1909	turka	R. Ajdina	Paris
1909	kroata	D. Bedekoviĉ	Zagreb
1909	armena	Ter Astvacatrjan	Tiflis
1909	islanda	T. Tornsteinsson	Reykjavik
1910	slovena	L. Koser	Zagreb
1910	kartvela	Ivaniŝvili	Tiflis
1911	ukrajna	?	Kraków
1911	tatara	?	Orenburg
1912	ĉina	Lu-Ŝi-Ĉin	Ŝanhai
1912	tagala	?	?
1913	kimra	?	London
1914	judhispana	?	París
1916	persa	B. Ŝidani	Teheran
1917	astura	Adam	Oviedo
1918	norvega	B. Rifling	Kristiania
1921	malaja	P. W. v. d. Broek	Leiden
1922	latina	J. Bianchini	S. Vito

La organizo de la esperantista movado.

La plimulto de la esperantistoj havas tre malklaran ideon pri la organizo de nia movado; ŝajna konfuzo regas pri la diversaj eroj de la esperantista movado, kvankam la nuna situacio estas pli klara, pli simpla kaj antaŭ ĉio pli komprenebla ol antaŭe. Simile kiel al kemiisto la kemiaj formuloj estas kompreneblaj signoj, tiel la aktiva esperantisto scias, kion signifas mallongigoj kiel I. C. K., UEA, K. R. L. K. K., N. S.; GEL, ĈAE, F. S. p. P. E. kaj tiel plu .... Por multaj esperantistoj tiuj mallongigoj estas kaj restas enigmoj; eĉ la plej disvastigita tia mallongigo, tiu de Universala Esperanto-Asocio, kelkfoje estas nekonata de samideano, ne leganta gazeton.

Antaŭ la milito la problemo plej ŝatita de la aktivuloj estis la maniero sin organizi internacie. Estas pruvo de la viveco de nia movado, ke tia teda, enuiga kaj senfrukta diskutado ĉiam povis allogi la homojn. *Bone prosperos tio, kio longe daŭras,* kaj fine ankaŭ la internacia organizaĵo esperantista aranĝiĝis dank' al la klopodoj de kelkaj malnovaj esperantistoj, vidantaj kun zorgo kiom da tempo kaj mono forprenis tiuj senfinaj diskutoj kaj kombinoj. Efektive hodiaŭ la organizo sin prezentas sub formo plej simpla kaj racia; ke ne ĉiuj komprenas la nunan situacion dependas de la manko de tradicio; post kelkjara agado la ĝenerala konsidero ŝanĝas kaj regos plena certeco pri la *"kio"* kaj *"kiel"* de la organiza maŝinaro.

Analizante la konstruaĵon, nomata Oficiala Esperantista Organizo ni vidas antaŭ ĉio du partojn, kiuj formas la tuton. Ambaŭ partoj malsimilas en la interna konsisto de la eroj kaj ambaŭ malsimilas en la procedoj aŭ laboroj. Ni vidas unuflanke en ĉiu lando societon, kiu koncentrigas la lokajn grupojn kaj izolulojn esperantistajn en sia lando. La Svisa Esperanto Societo, La Ĉehoslovaka Asocio Esperantista, La Belga Esperantista Ligo estas kelkaj ekzemploj. La celo de tiuj Societoj, kiujn oni nomis *Naciaj Societoj* estas antaŭ ĉio reprezenti la esperantistan movadon en sia lando antaŭ registaroj, okupiĝi pri la propagando kaj instruado, ununvorte interesigi la publikon pri la problemo de la Lingvo Internacia. Pli trafa estus la esprimo *Propaganda Societo* aŭ *Landa Societo;* kelkfoje la vorto NACIA donas neklaran komprenon pri la afero. Tiuj societoj, kiuj inter si ne estis ligataj, formas do la unuan kaj ni diru la plej gravan parton de la esperantista movado. La dua parto estas la organizaĵo, kuniganta internacie individuajn esperantistojn por la praktika uzado de la lingvo, la transformo de la teorio en la praktikon: *Universala Esperanto-Asocio.*

UEA bazas sur individua membreco kaj ne havas naciajn sekciojn. La aliĝo al Nacia Societo estas libervola; loka grupo, kiu ne volas

partopreni la nacian movadon ne povas esti devigata al aliĝo. Same la membreco al UEA estas libervola; ano de grupo aŭ de Nacia societo ne povas esti devigata aliĝi al UEA.

Tiuj du partoj de nia movado — *nacia-propaganda || internacia-praktika* — ne havis firman rilaton unu kun la alia. Provo de interkonsento inter ambaŭ malsukcesis pro internaj kialoj, principaj konsideroj kaj ne sufiĉa evoluo de la organiza spirito ĉe la esperantistoj. El tio rezultis kelkfoje miskompreno pri la roloj kaj kompetenteco de ambaŭ, ĝis fine la kongreso en Helsinki solvis la problemon per la interkonsento, nomita

Kontrakto de Helsinki.

Tiu-ĉi kontrakto de Helsinki, farita inter la reprezentantoj de la du partoj de nia movado antaŭ ĉio zorgis pri reprezentado de la Naciaj Societoj. Kiel dirite, la Naciaj Societoj laboris ĝis tiam en la koncernaj landoj, sed ne multe sin interesis pri tio, kio okazas internacie. Ĉiu Nacia Societo aliĝinta al la "Oficiala Esperantista Organizo" kaj paganta la kotizon elektas reprezentanton al la *Konstanta Reprezentantaro* (mallonge K. R. aŭ *KORO*). La Naciaj Societoj, antaŭe dise kaj senreprezente havas do delegitaron, en kiu ĉiu el ĝi sidas. Kune tiu-ĉi *KORO* formas la kontraŭpezon al la firme organizita UEA, reprezentita per ĝia komitato. La malsameco de la klopodoj necesigas, ke ekzistu plej supera aŭtoritato, kiu povos decidi kaj gvidi aferojn, kiujn ambaŭ solaj ne povus fari. Estas la

INTERNACIA CENTRA KOMITATO
de la Esperanto-Movado

konsistanta el ses anoj kaj elektataj de la KORO kaj UEA. Tiu-ĉi I. C. K. reprezentas internacie la Oficialan Organizon Esperantistan antaŭ la publiko kaj zorgas pri la ĝeneralaj interesoj de l'esperantismo. Malpli klara estas la faka organizo. Sub Faka Organizo oni komprenas grupiĝon de esperantistoj por profesiaj, religiaj kaj politikaj celoj. Ili ĝis nun ne partoprenas en la Oficiala Organizo pro bone kompreneblа kialo. La propagando de nia ideo, farata laŭloke kaj laŭlande estas ĉefe laboro de la Naciaj Societoj; la utiligo de Esperanto por konkretaj celoj tiu de la Universala Asocio. La unua sin turnas al la neesperantista publiko ne sin okupanta pri la religio, profesio kaj politika sinteno. Lingvo Internacia povas esti egale utila al katoliko kiel al mahometano, al laboristo kiel al kapitalisto ktp. La dua sin turnas al la esperantistoj kaj aranĝas por ili s e r v o j n. Ambaŭ organizaĵoj do deklaras la nepran neŭtralecon en religiaj, rasaj kaj politikaj problemoj; iuj formale tion deklaras en la statuto kaj plej rigore tion faras la Universala Asocio. Estas do evidente, ke Fakaj societoj kun tute

speciala klopodado devas malatenti tiun devigan neŭtralecon kaj sekve ne povas esti konsideritaj kiel eroj de la Oficiala Organizo, reprezentanta la tutan movadon. Restas nur la ebleco ke la *profesiaj* societoj aliĝu kiel *Faka* al la Universala Asocio kies celo estas la utiligo de la lingvo por ĉiutagaj aferoj. Al la feliĉa solvo, kiun ni atingis en Helsinki venos la enkorpigo de la profesiaj societoj en la oficialan organizon kompletigonta la konstruaĵon de nia movado tiel ke ni vidu plenumitaj la belajn parolojn de nia majstro:

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda konstante frapante
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo post longa laboro
Atingos la celon en gloro.

Bibliografio pri la Organizo de la Esperantista movado...

Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj historiaj bibliografiaj kaj statistikaj aferoj. Eldono de la Internacia Centra Komitato, 12 Boulevard du Théâtre, Genève . . .

Nova serio: Deksesa Universala Kongreso de Esperanto, Vieno 1924.
Deksepa Universala Kongreso de Esperanto, Genève 1925.

Organiza Statutaro: Entenas la Kontrakton de Helsinki, Regularon de la Kongresoj, Regularon de la Konstanta Reprezentantaro kaj Statuton de UEA.

Oficialaj Institucioj.

Internacia Centra Esperanto-Komitato [C. K.] konsistanta el ses anoj, funkciantaj dum tri jaroj (1923—1926). Ĝi estas elektata de la *Konstanta Reprezentaro* kaj de Universala Esperanto-Asocio, kaj zorgas pri la ĝeneralaj interesoj de nia movado.

Anoj kaj laborkampo:

Dro Edm. Privat, 12 Boulevard du Théâtre, Genève (Svis.)
(Prezidanteco kaj Generala Propagando).
M. Rollet de l'Isle, 35 rue Sommerard Paris 5
(Teknikaj fakoj).
Prof. Dro J. Dietterle, Seumestrasse 10, Leipzig-Schl.
(Instruado, literaturo, statistiko).


Internacia
Centra
Komitato
Komitato de
UEA
Konstanta
Reprezentantaro
UEA
AEA
AEA
AED
BEL
BLE
BES
BEA
ĈAE
GEL
CDEL
EAE
ESE
SFPE
GEA
HEA
KEF
HES
IEF
JEI
RES
LEA
NSE
NEA
PEA
ERK
RES
SEF
SES
UES
EANA
EAK
DEA

RUD. HROMADA, 333 Sochařska, Praha VII
(Informado, gazetaro).
W. M. PAGE, 31 Queen Street, Edinburgh, Skotlando
(Financoj kaj Juro).
Sino JULIA ISBRÜCKER, 10 van Beverningkstraat, Den Haag
(Socia Fako).

Dro WON KENN, 15 Hong Kung Chik Street 15, Kanton
(Konsilanto por Ekstrem-Oriento).
ENRIQUE LEGRAND, Larranaga 140, Montevideo
(Konsilanto por Suda Ameriko).

Administrado:

ROBERT KREUZ, Gen. Sekretario. ANDREO CHE, Sekretario.

Sekretariejo:

12 Boulevard du Théâtre, Genève, Svislando.

Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj [K. R.]. Ĉiu nacia societo esperantista elektas po *unu* reprezentanton. *Honora prezidanto*: Generalo H. SEBERT, 14 rue Brémontier, Paris XVII. — *Prezidanto*: JOHN MERCHANT, Meersbrook Bank, 43 Cliffefield Road, Sheffield. — *Sekretario-kasisto*: CH. H. EDMONDS, 21 Russelcroft Road, Welwyn Garden City (Angl., Hertfordshire).

Reprezentantoj de la aliĝintaj Societoj.

Argentina: G. B. LOPES, str. San Pedrito 341, (Flores) B. Aires.
Aŭstralazia: Sro FARAKER, Australia House, Strand, London W. C. 1.
Aŭstria: HUGO STEINER, Bisamberg 248 bei Wien.
Belga: FRANS SCHOOFS, 11 Kleine Hondstraat, Antwerpen.
Brazila: J. B. de MELLO SOUZA, Copacabana 830, Rio de Janeiro.
Brita: MONTAGU C. BUTLER, 17 Hart Street London W. C. 1.
Bulgara: ATANAS D. ATANASOV, str. Oboriŝte 44, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Dro STAN. KAMARYT, Telocvična 3, Bratislava.
(GEL) Pro Inĝ. SCHOLZE, Klotildenstrasse 6/II, Reichenberg.
Dana: MARTIN BLICHER, Bredgade 63, Köbenhavn.
Estona: Fino HILMI DRESEN, Postkast 6, Tallinn.
Finnlanda: ALBIN SANDSTRÖM, Kopmansgatan 11, Helsinki.
Franca: HENRI DUBOIS, 4 rue du Loing, Paris 14.
Germana: Dro HEINRICH ARNHOLD, Waisenhausstrasse 18/22, Dresden.
Hispana: JULIO MANGADA-ROSENÖRN, Glorieta de Bilbao 5, Madrid.
Hungara: Dro J. TAKÁCS, Vaczi utca 8—I—12, Budapest IV.
Japana: S. SINDO, Siu Ogaŭa machi 111—14, Tokio.

Itala:
Kataluna: MARIANO SOLA, San Francisco 13, Terrassa.
Latva: TALIVALDO INDRA, Pasta Kaste 475, Riga.
Litova: Pastro DOMBROVSKI, Rotužes Aikŝte 6, Kaunas.
Nederlanda: J. R. G. ISBRÜCKER, v. Beverningkstraat 10, Den Haag.
Norvega: ROLF BUGGE-PAULSEN, Baldersgatan 9, Oslo.
Pola: JAN KOSTECKI, Dluga 28, Warszawa.
(Konkordo) EDVARDO WIESENFELD, str. Dzika 9/10, Warszawa.
Rumana: HENRIKO FISCHER, Alea Suter 19, Bucuresti.
Sveda: PAUL NYLEN, Huddinge, Stockholm.
Svisa: Dro EDMOND PRIVAT, 12 Bd. du Théâtre, Genève.
Urugvaja: . . . . . Calle San José 1139, Montevideo.
Usona: E. A. N. A., 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17.
Kalifornia: A. S. VINZENT, Bank of California, 400 California street, San Francisco Cal.

Universala Esperanto-Asocio (UEA). *Honora prezidanto*: ED. STETTLER, Bundesgasse 16, Bern (Svis.). — *Prezidanto*: Dro EDM. PRIVAT, 12 Boulevard du Théâtre, Genève (Svis.). — *Vicprezidanto*: W. M. PAGE. — *Direktoro*: HANS JAKOB, 12 Bd. du Théâtre, Genève, ĉe la Centra Oficejo de UEA.

Esperantista Lingva Komitato, konsistanta el lingvaj kompetentuloj kies nombro ne estas limigita. La anoj de la L. K. estas elektataj de la Lingva Komitato mem por 9 jaroj laŭ listo starigata de la Akademio. Rajtas prezenti kandidatojn la Naciaj Societoj, UEA kaj la Fakaj Societoj. Nuntempe la L. K. konsistas el 110 anoj. Laŭ la lingvo partoprenas: Angla: 15; Bulgara 1; Ĉeĥa 5; Ĉina 2; Dana 1; Finna 1; Flandra 2; Franca 18; Germana 18; Greka 1; Hebrea 3; Hispana 6; Holanda 3; Hungara 5; Itala 6; Japana 1; Kataluna 4; Ladina 1; Litova 1; Pola 4; Portugala 3; Rumana 1; Rusa 5; Sveda 2.

Esperantista Akademio, supera komisiono de la Lingva Komitato. *Prezidanto*: Pro TH. CART, 12 rue Soufflot, Paris V. — *Vicprezidantoj*: J. M. WARDEN kaj Dro DIETTERLE. — *Direktoroj de Fakaj Sekcioj*: Pro E. GROSJEAN-MAUPIN, Dro W. LIPPMANN, Dro EDM. PRIVAT. — *Membroj*: W. BAILEY, Dro PIERRE CORRET, P. CHRISTALLER, A. DOMBROWSKI, V. INGLADA, G. ISBRÜCKER, E. KÜHNL, P. DE LENGYEL, B. MIGLIORINI, E. A. MILLIDGE, P. NYLÉN.

Akademiaj Korespondantoj: Sro ROLLET DE L'ISLE (Scienca kaj Teknika Vortaro), Sro W. SETÄLÄ (Finna lingvo), Sro M. SOLÁ (Kataluna), Sro A. TELLINI (Ladina), Dro LEONO ZAMENHOF (Pola), Sro EDV. BACKHEUSER (Portugala).

Sekcio Komuna Vortaro: Pro GROSJEAN-MAUPIN, Direktoro, Sroj BAILEY, MIGLIORINI, MILLIDGE, NYLÉN, BÜNEMANN, SOLÁ, membroj,

Sekcio Gramatiko: Dro LIPPMANN, Direktoro, Sroj CHRISTALLER, CORRET, DE LENGYEL, COLLINSON, STOJAN, membroj.

Sekcio Elparolo kaj Premioj: Dro PRIVAT, Direktoro, Sroj ISBRÜCKER, KÜHNL; Sino HANKEL, Sroj DE MÉNIL, STRŒLE, membroj.

Lingva-Komitatanoj.

(La anoj kun steletoj montras la anojn de l'Akademio.)

ARNHOLD, Dro Heinrich, Tiergartenstrasse 32, Dresden.
AYMONIER, Camille, 8 Rue Ernest-Cresson, Paris 14e.
BACKHEUSER, Edvardo, Caixa postal 2494, Rio de Janeiro.
BAGHY, Julio, Rottenbiller ut. 66-I-20, Budapest VII.
*BAILEY, William, 32 Crescent Road, Cheetham Hill, Manchester.
BASTIEN, M., Boulevard St. Michel 99, Paris 5.
BEHRENDT, Arnold, Hohenstaufenstrasse 24, Berlin W.
BELMONT, Leon, Marŝalkovska 97A, Warszawa, Pol.
BIANCHINI, P. J., Pradis-Clauzetto, Udine, Ital.
BLAISE, Sino Marg., Manor Way, Headstone Lane, North Harrow, Middlesex, Angl.
BLICHER, Martin, Bredgade 63, III, Kopenhago, Dan.
BLOK, H., Rijnstraat 43-II, Amsterdam.
BOBIN, M., 21 Rue Vital, Paris 16e.
BOUCON, H., 10 Boulevard du Lycée, Annecy, Hte Savoie, Franc.
BREMÓN Y MASGRAU, Dro J., Balmes 102, Barcelona.
BULTHUIS, H. J., Daguerrestraat 84, Hago, Nederlando.
BÜNEMANN, Oskar, Alsterkrugchaussee 586, Hamburg-Fuhlsbüttel.
BUSUTTIL, Dro G., Victoria-Avenue 48, Sliema, Malta.
BUTIN, Max, Bahnhofstrasse 30, Godesberg, Germ.
BUTLER, Montagu C., 17 Hart Street, London W. C. 1.
*CART, Théophile, 12 Rue Soufflot, Paris 5e.
CHAVET, Gabriel, 57 Rue Caulaincourt, Paris 18e.
*CHRISTALLER, Paul, Neue Weinsteige 61, Stuttgart.
COLLINSON, W. E., University of Liverpool, Liverpool.
*CORRET, Dro Pierre, 97 Rue Royale, Versailles.
COUTO FERNANDEZ, A., Lavanjeiras 225, Rio de Janeiro.
CZUBRYNSKI, Dro A., Twarda 55A, m. 12, Warszawa VI.
DEGON, P., 54 Rue Perronet, Neuilly sur Seine.
DELVAUX, L., 10 Boulevard Joseph II, Charleroi, Belg.
*DIETTERLE, Dro Johann, Seumestrasse 10, Leipzig-Schl.
DÍEZ, F., Ascao 4, Bilbao, Hisp.
*DOMBROWSKI, A., Rotušes Aikšte 6, Kaunas, Litov.
DREHER, L., Starowislna 37, Kraków, Pol.

EDMONDS, Ch., 21 Russellcroft Road, Welwyn Garden City, Angl.
FISCHER, Henriko, Alea Suter 19. Bucuresti, Rum.
FISHER, Dro A., ul. Perovskij, Leningrad, Ruslando.
FLOURENS, Sino Roksano, 43 Cours Joseph-Thierry, Marseille.
FRIDÖRI, Heinrich, Schaffhauser Strasse 15, Zürich, Svis.
FUĴISAVA, Ĉikao, Tokio, Jap. [Adreso ne konata 1. II. 26].
FURTADO Mur, Rua 1a de Março 42, Rio de Janeiro.
GHEZ, Dro A., Via Luigi Ricci 10, Trieste, Ital.
GRAU CASAS, Josep, Casanova 117, Barcelona.
*GROSJEAN-MAUPIN, 56 Boulevard des Invalides, Paris VII.
HANKEL, Sino Marie, Nicolaistrasse 18, Dresden.
HARVEY, W., 17 St. Clair Terrace, Edinburg, Skotlando.
HROMADA, Rudolf, Socharská 333, Praha III, Ĉeĥoslov.
*INGLADA, V., Prof. de la Escuela superior de Guerra, Madrid.
*ISBRÜCKER, J. R. G., van Beverningkstraat 10, Hago, Nederlando.
JODKO, A., Ananovskij per. dom 5, loĝ 5, Moskvo, Ruslando.
KALOCSAY, Dro K. de, József utca 4, I. 8, Budapest VIII.
KAMARYT, Dro Stan., ul. Telocvična 3, Bratislava, Ĉeĥoslov.
KASTNER. Ilica Br. 4, Zagreb, SHS.
KENN, Won, Dro, 15 Hong Kung Chik Street, Kanton.
KRESTANOFF, Ivan, Pirdop, Bulgar.
*KÜHNL, Edvardo, Dittrichova 7, Praha II.
LAJARTE [R. Dufaure de] 4 Villa d' Orléans, Fontenay sous Bois, Seine.
LEJZEROWICZ, J., Kilinskiego 30. Lodz, Pol.
*LENGYEL, Paulo, Maria Valeria Telep allami uj lakás 32/280, Budapest.
*LIPPMANN, Dro Walter, Tauchaer Strasse 10, II, Leipzig.
LOY, Karl, Kronach 212, Bayern, German.
LUNDGREN. John, Hedemora, Sved.
LUTTEROTH, Dro Askan, Parkstrasse 38—40, Breslau 16.
MANGADA ROSENÖRN, J., Glorieta de Bilbao 5, Madrid.
MANN, William W., Dreilindenstrasse 49, Nikolassee b. Berlin.
MAZZOLINI, Alessandro, Via Montevecchio 31, Fano, Marche, Ital.
MELCKEBECKE, Dro van, Avenue de France 22, Antwerpen.
MÉNIL, F. de, 21 rue de l'Hotel de Ville, Neuilly sur Seine.
*MIGLIORINI, Bruno, Via Alessandro Poerio 29, Roma 45.
*MILLIDGE, E. A., "Starcross" Midway, Telpham, Sussex, Angl.
MINOR, Karl, Hallerstrasse 6, Hamburg.
MOJADO, Mariano, Abascal 13, pral. A. Madrid.
MUČNIK, J., ĉe Sro Chavkin, str. Bezalel, Jerusalem.
*NYLÉN, P., Gröna Villan Huddinge, Stockholm.
OBRUČEV, S., Arbat Kalošin p. 4, kv. 18, Moskva.
PADFIELD, W. W., 3 Cedar Villas, Bath. Angl.
PITLÍK, Augustin, Kremenĉová 17, Praha II, Ĉeĥoslv.

*PRIVAT, Dro Edmond, 12 Boulevard du Théâtre, Genève, Svis.
PULVERS, Sino Charlotte, Frobenstrasse 8, Basel, Svis.
RÁCZ, Dro B., Verseny u. 4, Budapest VII.
REED, Edward C., 2518, 17th Street, N. W. Washington, D. C. Usono.
REED, Sino Ivy Kellerman (la sama adreso).
ROHRBACH, Dro, Galbersweg 6, Gotha.
ROLLET DE L'ISLE, 35 rue du Sommerard, Paris 5 e.
ROUSSEAU, C., Place de la République 4, Levallois-Perret, Seine.
SABADELL, A., Rambla de Cataluña 54, Barcelona.
SCHMID, Jakob, Müslinweg 2, Elfenau, Bern, Svis.
SCHMIDT, Dro A., Telegraphenberg Potsdam, Berlin.
SCHRÖDER, J., Kaiserstr. 10, Wien VII.
SEBERT, H., Generalo, 14 Rue Brémontier, Paris 17 e.
SEPÚLVEDA CUADRA, L., Calle de Madrid 1324, Santiago de Chili.
SETÄLÄ, Vilho, Fredrikink, 71/23, Helsinki, Finlando.
SHAFER, Fino Ad. Gloucester Crescent, Regents Park, London.
SIMON, Otto, Billrothstrasse 31, Wien XIX.
SINPAK, A., Institut Franco-Chinois, Fort St. Irénée, Lyon.
SOLÁ, M., San Francisco 12, Tarrassa (Barcelona).
STAMATIADIS, Dro Anakréon, Vathy, Samos, Greklando.
STOJAN, Petro, 12 Bd. du Théâtre, UEA, Genève, Svis.
STROELE, Georges, Maujobia 7, Neuchâtel, Svis.
ŠUPICHOVÁ, Fino J., Malá Štěpánská 6. Praha II, Ĉeĥoslv.
TELLINI, Achille, Gombruti 5, Bologna VI, Ital.
TÖRÖK, Petro, Meŝterutca 1, Debreczen, Hungar.
UITTERDYCK, D., Hyacintenlaan 3, Hilversum, Holland.
UNDERHILL, Dro J., Idaho Springs, Colorado, Usono.
VAONA, Attilio, Via S. Egidio 4/6, Verona, Ital.
VILLANUEVA, A. L., Vergara 11, Murcia, Hisp.
*WARDEN, John Mabon, Cluny Drive 41, Edinburg, Skotlando.
WENGER, Jean, Côte 113, Neuchâtel, Svis.
WIESENFELD, Edvardo, (Lonkopolanski) Biała 3, Warszawa, Pol.
WITTERYCK, A. J., Steenbrugge (Bruges), Belg.
ZAMENHOF, Dro Leono, Marszalkowska 125, Varsovio, Pol.
ZSCHEPANK, Fino J., Paul Gerhardtstr. 22, Dresden A. 19.

Internaciaj Organizaĵoj.

Internacia Scienca Asocio Esperantista. — *Fondo*: 1906. — *Organizo*: Individuaj membroj laŭvole apartigitaj laŭ sekcioj de specialistoj. — *Kot.*: Subtenanta membro 2,50 Dol., aktiva membro 0,50 Dol., Societoj 5 Dol. pojare. — *Gazeto*: "Bulteno de ISAE". —

Servoj: Helpo al sciencaj laboroj, teknikaj terminaroj, antaŭenigo de la uzado de Esperanto en sciencaj kaj teknikaj rondoj. — *Estraro* (provizora): Prez.: Profesoro ODO BUJWID, Krakovo; Sekr.: M. ROLLET DE L'ISLE; Paris; Kas.: C. ROUSSEAU. — *Adreso* (provizora): Sro ROLLET DE L'ISLE, 35 Rue du Sommerard, Paris 5.

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA). — *Fondo*: 1907. — *Gazeto*: Internacia Medicina Revuo. — *Estraro*: Prov.: Dro M. BLASSBERG, Starowislna 18, Kraków. — *Adreso* (Centra Oficejo): Dro ROBIN, Marszalkowska 113, Warszawa, Pollando.

Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (I.A.E.F.) — *Refondo*: 1921 en Praha. — *Organizo*: Individuaj membroj; Subtenantoj-neesp., centra komitato. — *Kot.*: Ĉiu paginta ano ricevas la oficialan organon. Kotizoj: Aŭstrio 5.50 Ŝil.; Angl. 6 Ŝil.; Belgio 17 Fr.; Ĉeĥoslovakio 20 kĉ.; Danujo 4 Kr.; Francio 17 Fr.; Germanujo 2,50 Rmk.; Hungarujo 4 OK.; Italio 20 L.; Japanujo 3 J.; Jugoslavio 40 D.; Nederlando 2 G.; Norvegujo 7 Kr.; Polujo 3 Zl.; Svedio 4 K.; Usono 1 D.; Svislando 4 Sv. fr. Aliaj landoj pagu la egalvaloron de 4 svisaj frankoj. — Novaj anoj pagas enirtakson de 10% de l'kotizo. Subtenantoj = anoj nefervojistaj; kotizo kiel aktivaj anoj. Bonfarantoj = anoj pagantaj unufoje por ĉiam kotizon de 100 Frk. svis. La kotizo estas ĉiujare fiksata denove en la jarkunveno de I.A.E.F., dum Universala Kongreso. — *Gazeto*: "La Fervojisto". — *Servoj*: Eldoni fakan terminaron. — *Stato*: 1./1. 1926: 630 membroj. — *Estraro*: Elektita dum la XVI. U. K. en Vieno: Prez.: STEVAN STOJNIĆ, kontroloro de ĝenerala fervoja direkcio en Beograd, kolonija Min. Saobračaja n-ro 17, Jugoslavio. Viceprez. kaj redaktoro: ILIJA PUHALO, fervoja oficisto, Zagreb, Strojarska cesta. Jugoslavio. Sekr.: STJEPAN S. SLUKAN, Strojarska cesta, Zagreb. — Kas.: EMIL SLAVIČEK, fervoja oficisto, Zagreb, želj. spremište materijala, Jugoslavio. Revizoroj: 1. KATICA KUKEC, fervoja oficistino, želj. stanica Koprivnica, Jugoslavio. 2. STJEPAN SOBOTA, fervoja oficisto, Direkcija drž. željeznica, Zagreb, Jugoslavio.

Naciaj reprezentantoj (asesoroj):

Angla: S. HODGES, ferv. oficisto, 96 Herga Road, *Wealdstone*, Middlesex.
Bulgara: IGNAT NIKOLOV, ĉinovnik, gara *Sofia*.
Ĉeĥoslovaka: VLADIMIR BENDA, oficisto, *Roztoky* n/Vl.
Dana: MARTIN PALSBERG, fervojoficisto. Langelandsgade no 4/1, *Aarhus*.
Estona: AUGUSTIN PUNG, fervoja admin., Telliskivi str. 34, *Tallinn*.
Finna: H. SALOKANNEL, staciestro, *Salminen*.
Germana: GEORG HABELLOK, fervoja inspektoro, Schleiermacherstr. 19, *Breslau*.
Hungara: TEODORO KOVÁCS, fervojisto, Határ utca 9, *Pestujhely*.

Itala: Prof. Di Demetrio Francesco, Servizio Lavori e Costruzioni Ferrovie dello Stato, *Roma.*
Jugoslava: Stjepan Mužinić, fervojoficisto, Mažuranićev trg 1, *Zagreb.*
Latva: A. Znotens, Alberta eela 20; dr. 4 Leepaja.
Nederlanda: A. Pelder, *Leiden,* Rijn en Schikade 61.
Norvega: R. Horrisland, fervoja oficisto, *Iveland,* Krsand st.
Pola: Zygmunt Greffkowicz, Olesińska 13 m. 18, *Warszawa-Mokotov.*
Sveda: Ernst Eriksson, fervojoficisto, Västerasgatan 2, *Stockholm-Wa.*
Svisa: Jules Perlet, fervojoficisto, Postfach Transit 560, *Bern.*
Usona: Ing. Edward M. Rosher, *San Francisco,* 125a Beulah St.

Adreso:

a) Ĝeneralaĵoj kaj kunlaboraĵoj por **"La Fervojisto"** al vicprezidanto.
b) Kasaferoj: Al kasisto.

Redakcio kaj administracio de "La Fervojisto" ĉe la vicprezidanto.

Internacia Asocio por la propagando de la Aŭtonoma Muziknotado [I. A. P. A. M. N.]. — *Fondo*: Aprilo 1924. *Kot.*: Izoluloj: ĉiujare kvin belgaj frankoj; Societoj: ĉiujare 10 b. fr. — *Organizo*: Izolaj membroj kaj societoj aprobantaj la A. M. N. — *Estraro*: Komitato kvinmembra inter kiuj unu direktanta delegito. — *Celo*: diskonigi kaj uzigi la A. M. N. ĉiurimede en la tuta Mondo. — *Gazeto*: provizore: Belga Esperantisto. — *Adreso*: L. Cogen, 52, Drève, Ninove, Belg.

Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-oficistaro. (ILEPTO) — *Fondo*: 1911. — *Organizo*: Individuaj kaj kolektivaj membroj. — *Kot.*: 2 Frk. sv., kolektiva 15 Frk. pojare. — *Gazeto*: "Interligilo". — *Servoj*: Propagando inter samprofesianoj, ĉe poŝtaj administracioj, kreo de faka vortaro, apliko de Esp. per informservo pri fakaj demandoj. — *Estraro*: Supera registara konsilisto Otto Reber (Bamberg), Honora prez.: Dro Ed. Spielmann, supera poŝtoficisto, ĉefprezidanto; R. I. Filliatre, telegrafoficisto, St. Cyr-l'École, France, ĉefsekretario; Hans Obrist, supera telegrafoficisto, Brückfeldstrasse 23, Bern. — *Adreso*: Ĉe la ĉefprez.: Gesellschaftsstrasse 39, Bern.

Internacia Asocio de la Esperantistoj Stenografistoj. — *Fondo*: 1923. — *Organizo*: Individuaj membroj kaj teritoriaj aŭ sistemaj asocioj. — *Servoj*: Grupigi izolajn personojn kaj societojn; propagandi Esper. en stenografistaro kaj stenog. en esperantistaro; informi pri la diversaj sistemoj; verki teknikan steno-skribmaŝinan vortaron; studi la demandojn sciencajn aŭ profesiajn; instrui profesorojn pri esper. stenog. disvastigi la profesion de Esperanto-stenografistoj. — *Kot.*: por la izolitaj personoj 5 francajn frankojn ĉiujare, 10 f. por la societoj. — *Gazeto*: "Internacia Stenografisto". — *Adreso*: Ĉe la prez.: P. Flageul, 9, Boul. Voltaire, Issy-Seine (Franc.).

Sennacieca Asocio Tutmonda. — *Fondo*: 1920. — *Organizo*: Individuaj membroj, sen naciaj sekcioj. — *Kot.*: 3 Fr. sv. — *Gazetoj*: "Sennaciulo (semajna) kaj Sennacieca Revuo" (monata). — *Servoj*: Utiligi E. por la klasaj profitoj de la proletaro tutmonda, krei internacian literaturon kaj sennacieean spiriton, embrie funkciigi socieion kiel estonte funkcios la tutmonda socio. Helpo per informoj, vojaĝoj, enketoj, dokumentado. Libro-eldonoj per Akcia Kooperativo Eldona. — *Stato*: 3500 membroj. — *Adreso* (Asocia Sidejo): 23 Rue Boyer, Paris XX. (Admin.: abonoj kaj aniĝoj): Colmstrasse 1-III, Leipzig-Stötteritz (German.).

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I. K. U. E.). — *Fondo*: 1910. — *Organizo*: Naciaj Ligoj kaj individuaj membroj. — *Kot.*: Afranko de simpla letero aleksterlanda. — *Budĝeto* 1926: 225 Guld. — *Gazeto*: "Espero Katolika". — *Estraro*: Prez.: Pastro F. Meŝtan; Vicprez.: Fino M. Larroche: Ĝen. Sekr.: P. A. Schendeler; Estrarano: J. E. Hookham. — *Adreso*: Ĉe la ĝenerala sekretario, Prins Hendrikstraat 30 E., Eindhoven (Nederlando).

Mondjunularo Katolika (MOKA). *Fondo*: 1920. *Celo*: Internacia solidareco de la katolika junularo, kunlaborado de la junulmovado en la Internacio Katolika (IKA), agado por internacia paco, por renovigo de la homaro per la amo de Kristo, disvastigado de Esperanto. *Organizo*: Delegitoj, grupoj, naciaj sekretariejoj, aliĝintaj organizaĵoj. *Kotizo*: Laŭvole. *Gazeto:* "Katolika Mondo" (dusemajne) kaj ĝia aldono „La Juna Batalanto". *Stato*: membroj en 24 landoj. *Servoj*: Reciproka subteno, ĉiujare internaciaj kunvenoj, informservo pri la katolika junularo, interŝanĝo de gazetoj ktp., kunlaborado kun movadoj de la junularo kaj de la pacifismo. *Estraro*: Protektoro: grafo Gusztav Karoly Majlath, episkopo de Alba Julia (Rumanujo); honora prezidanto: Prof. W. Arnold, Zug (Svis.); ĉefsekretario: Hanns Sappl, München (Germ.). *Adreso*: Wilh. Solzbacher, Spiesgasse 1, Honnef a. Rh. (Germ.).

Internacio Katolika (IKA). Esperanto-Sekcio. *Fondo*: 1920. *Celo*: Internacia kunlaborado de la katolikoj ĉiulandaj, agado por la katolika paca idealo. La Esperanto-Sekcio estas la plej aktiva grupo en IKA. *Organizo*: Delegitoj, grupoj. *Stato*: 2200 aktivaj membroj en 30 landoj. *Servoj*: delegito sistemo, gazeto, kongresoj, eldonejo, publikigo de Esperanto-rubrikoj en katolikaj gazetoj, kunlaborado kun internaciaj kaj naciaj katolikaj organizaĵoj. *Gazeto*: "Katolika Mondo" (dusemajne). *Adreso*: ĉefsekretario Kaspar Mayr, 16 Red Lion Square, London WC1, Brit.

★ **Kristana Esperantista Ligo Internacia.** — *Fondo*: 1913. — *Kot.*: 1 sv. fr. kaj libervola aldono. — *Gazeto*: "Dia Regno". — *Servoj*: Subtenas per E. la biblian Kristanismon, helpas enkonduki E. en internaciajn organizojn de sinceraj kristanoj. Ĝi ankaŭ subtenas la disvastigon de kristana Esp.-literaturo akordiĝanta kun la biblio. — *Estraro*: Prez.: PAUL HÜBNER kaj 7 naciaj vicprezidantoj. — *Adreso*: (Agada komitato): PAUL HÜBNER, Bergstrasse 1, Quedlinburg (Germ.), ROD. HORNER, Genève; H. A. LUYKEN, 23, Arcadian Gardens, Wood Green, London N 22.

Teozofia Esperanta Ligo. — *Fondo*: 1911. — *Organizo*: Naciaj sekretarioj, individuaj membroj. — *Kot.*: 5 svisaj Frankoj jare kun abono al "Espero Teozofia"; speciala aranĝo por malbonvalutaj landoj. — *Gazeto*: "Espero Teozofia". — *Servoj*: Praktika Apliko de E. por la teozofia movado. — *Stato*: 100 membroj. — *Estraro*: Prez.: M. TIARD; Vicprez.: J. GARRIDO; Sekr.: Sino Cimra. — *Adreso*: 17 Krakowska ulice, Praha II.

Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj. — *Fondo*: 1923. — *Kot.*: 1 Fr. sv. Subtenantoj 4 Fr. sv. — *Gazeto*: "Esperanta Ligilo". "Ligilo por Vidantoj". — *Servoj*: Reciproka helpo al blindaj samideanoj, eldono de gazeto. — *Estraro*: Prez.: J. KREITZ, Peschstrasse 29, Kreuzau bei Düren, Germ. Rheinland; Sekr.: VICTOR HENDRICX, 52 Ruststraat — rue du répos, Ukkel-Uccle, Belg.; 2a Sekr.: Fino ANNA FRIMAN, Andra Linjen 17, Helsingfors. Kas.: W. PERCY MERRICK, Penso, Shepperton, Angl. — *Stato*: 380 anoj.

Naciaj konsuloj.

Argentino: SIGISMUNDO TALADRIZ, General Pinto, F. C. O.
Aŭstralio: Fino T. ASTON, 42 Raleigh Street, Windsor, Melbourne, Vic. W. L. WATERMANN, 26 Henley Street, Torrensville, South Aŭstral.
Aŭstrio: Fino STEFFI ZEHETNER, Am Tabor 6, Wien, II.
Belgio: FRATO LUDOVIKO, Institution Royale des Aveugles, Woluwe.
Brazilo: F. A. DE ALMEIDA, Av. Paulo de Frontin 287, Rio de Janeiro.
Britlando: W. P. MERRICK, Penso, Shepperton.
Bulgario: ST. OROZOFF, Ul. Ljuben Karaveloff 44, Sofia.
Ĉeĥoslovakio: Fino ANASTASIA BARTUŠKOVA, Baráková ulice 644 České Budějovice.
Ĉilo: LUIS E SEPULVEDA CUADRA, Calle del Carmen 1288, Santiago.
Danmarko: Fino AGNES MELCHIOR, Blindeforskolen, Kallundborg.
Finnlando: ROBERT BERGH, Konstantinsgatan 15, Helsingfors.
Franclando: P. GILBERT, Villa Maria, Rue Merle, Cannes.
E. BARRIER, Rue Nicolas Charlet 1, Paris XV.
Germanio: Gesroj ZAPATER, Moltkestrasse 101, Köln am Rhein.
Hispanio: J. BELLFORT, Provenza 209, Pral. 2, Barcelona.
Hungario: Sro MIKLÓS BÁNÓ, Délibáb utca 23, Budapest VI.

Italio: Inĝ. A. R. TANCREDI, Regia Scuola Complementare, Savona.
Japanlando: T. KUMAGAE, Nyhon Mesojisto, Kayokoi, Yanai machi, Yamaguchi-Ken. — TOKUŜIRO TORII, Chitose Yama, Tiu Shigai.
Jugoslavio: Fino LJUBICA KRANJČEVIĆ, Mesnička ul. 34, Zagreb.
ALOJZIJ LEVSTEK, Posta Ribnica, Goričavas, Dolensko, Slov.
Latvio: HENRIKO ČAČE, Veja iela 17, Riga.
Meksiko: Sro MEZA, 8de Orizaba 154, Mexico D. F.
Nederlando: W. J. A. P. CRÉMAN, Overtoom 163, Amsterdam.
Norvegio: Redaktoro E. IMSDAHL, V. Torvgate 3, Bergen.
Pollando: W. STACHOWIAK, Krasinskiego 2, Bydgoszcz.
Rumanio: Fino JENNY KOHN, Alba-Julia.
Ruslando: Societo de Blindaj Esperantistoj. "Amikaroj" Petrogradskaja storona, Pesočnaja ulica 39 Leningrad.
Svedlando: H. THILANDER, Majorsgatan 12, Stockholm.
Svislando: LUIGI GRASSI, Airolo (Tessin).
Usono: E. MIDDLETON, Greenfield, Illinois.

Internacia Ligo de Liberpensuloj. — *Fondo*: 1923. — *Celoj*: Kunigi ĉiujn izolulojn kaj societojn, kiuj forlasis la religiajn dogmojn kaj alprenis liberan pensmanieron. Informi pri tutmonda liberpensula movado, disvastigi E. inter liberpensaj rondoj, aranĝi fakkunvenojn dum naciaj kaj internaciaj kongresoj esp. kaj liberpensulaj. — *Kot.*: Laŭplaĉe minimume 2 Ormk. germ. — *Gazeto*: "Liberpensulo" (senpaga al la membroj). — *Stato*: 3 societoj kaj 400 membroj. — *Estraro*: Prez.: Sro C. E. EVERTS, Alb. Cuypstraat 169, Amsterdam; Vicprez.: Sro GUST. WEIGEL, Bodenbach-Peiperz 4 (Ĉeĥoslovakio); Sekr.: Sro HUBRICHT, Mariannenstrasse 30, Leipzig; Revizoro: Sro RUD. BARTZSCH, Lochmannstrasse 4, Leipzig-Stötteritz. — *Naciaj reprezentantoj*: **Anglio**: Sino SUJADINOVA-YELLAND, 3 Fonthill Road, London N. 4; **Aŭstralio**: VIKTOR RUTLAND, 316 Riley Street, Surrey Hils, Sidney; **Belgio**: H. van DONINCK, St. Michelskai, Antwerpen; **Ĉeĥoslovakio**: TH. KILIAN, Jiráskova 317, Dolní kounice; **Ĉinio**: PANDIŠO, N. Y. M. S., Lunghwa, Shanghai; **Francio**: EMIL GASSE, 15 place Gambetta, Le Havre; **Hungario**: HUGAI FERENC, Gyöngyös; **Japanio**: JOSHI H. ISHIGURO, Koojimachi P. O. Box 1, Tokio; **Jugoslavio**: Sro PASKAL BOGDANOVIĆ, Komiža-Vis; **Polio**: JAN ZAWADA, ulica Krola Lesczynskiego 36 m. 2, Lublin; **Rumanio**: EDMUNDO VINCZE, Str. Capitanul Temes 3, Caransebes; **Rusio**: H. FRANK, Leningrad Gubkom Esperantistov, 3-aja Sovetskaja n-o 2 I, kv. 25; **Blankrusio**: DIM. SNEJKO, Minsk, peĉt. jaŝĉ 33; **Skotlando**: THOMAS CRAWFORD, Kelvinhaugstr. 24, Glasgow; **Usono**: KARL FRÖDING, 221-7th st. Rockford III. — *Adreso*: KURT HUBRICHT, Mariannenstr. 30, III, Leipzig-Neustadt (Germanio).

Vegetara Ligo Esperantista. — *Fondo*: 1908. — *Organizo*: Landaj sekretarioj en la ĉefaj landoj; individuaj membroj. — *Kot.*: Identa kun la abonpago por la revuo "Libero". — *Gazeto*: "Vegetarano", monate aperanta en la kadro de la revuo "Libero". — *Estraro*: Sekr. kasisto: OSCAR BÜNEMANN, Alsterkrugchaussée 586, Hamburg-Fuhlsbüttel.

Esperantista Literatura Asocio. — *Fondo*: 1911. — *Organizo*: Povas aliĝi ĉiu Esperantisto, kiu per libro, gazetartikoloj aŭ poemoj pliriĉigis nian literaturon. Aliĝa pago: 2 Gmk. — *Kot.*: 2 Gmk. laŭ koresponda valoro en ĉiu mono sendota per bankbiletoj en koverto. — *Servoj*: Konatiĝo inter verkistoj, reciproka helpo, korektado de verkoj-manuskriptoj. — *Stato*: 180 membroj. — *Estraro*: Prez.: Fino J. ZSCHEPANK. — *Adreso*: Ĉe la Prez., Paul-Gerhardt-Str. 22, Dresden-A.

"Tutmonda Polica Ligo". — *Fondo*: 1923 en Nürnberg. — *Organizo*: Individuaj membroj aliĝantaj per aliĝilo formas en unu loko, lokajn grupojn, laŭlande landajn sekciojn. Aliĝi povas aktivaj kaj pensiitaj policaj, sekurecaj, kriminalaj, justecaj, ĝendarmaj, limgardaj kaj ĉiuspecaj aliaj sekureckorporacianoj. Ĉiujare memstara kongreso (I. 1923 en Nürnberg, II. 1924 en Wien, III. 1925 en Leipzig). La ligo celas unuiigi tutmonde la sekurecajn korporaciojn per Esperanto, enkonduki la oficialan kaj devigan uzadon de Esperanto en servaferoj kaj en int. interrilatojn, evoluigi kaj unuecigi la sekurec- kaj kriminalservon tutmonde, alproksimigi la policon kaj publikon, kunharmoniigi la policon kun la mondtrafiko. Vigla interrilatiĝo kun estraroj. Fakscience, ekonomia, bonfara kaj sociala evoluigo de la polico per kreo de intern. institucioj. — *Kot.*: 1 USA dolaro (aŭ egalvaloro) popersone, pojare. (Por la jara kotizo ĉiu membro ricevas: 1. membrecon, 2. legitimacion, 3. revuon, 4. jarlibron kaj 5. senpagan korespondanoncon.) — *Oficiala organo* (gazeto): **"La Policisto"** (kune kun ĉiuj aldonoj). — *Servoj*: Personinterŝanĝo de liganoj dum-libertempe — helpo al la esperanta publiko en policaferoj — privat-policaj reserĉoj, esploroj, informoj (kontraŭ laŭtarifa rekompenco) — laŭeble senpaga loĝejo kaj malmulte-kosta nutraĵo por vojaĝantaj membroj — eldono de fakverkoj — por civilaj abonantoj de la fak-organo "Le Policisto" la ligo donas la samajn favoraĵojn kaj membrecon kiel al fakuloj en kaj pere de la civilfaka fratiigo: "Tutmonda Ligo de la Ordo". — *Stato*: En 5 kontinentoj, 46 landoj, 240 urboj eksistas (je la 31./XII. 1925): 53 grupoj, 2800 individuaj membroj. — *Estraro*: Ĝen. prez.: Dro J. SCHOBER, ekskanceliero aŭstria, nune policprezidanto de Wien; Ĝen. Direktoro A. H. DE MARICH, pens. hung. reĝa polica ĉefinspektoro, la fondinto de la ligo, ĉefred. de "La Policisto"; Direktoro A. POHLE, kriminala komisario, redakt. de "La Policisto"; ĝen. admin. ĉefsekretario ST. DE ROBOZ, red. de "La Policisto"; pluraj landaj prezidantoj, landaj ĉefsekretarioj kaj estraranoj. — *Adreso*: A. H. DE MARICH, Budapest IX, üllöi út 59. (Hung.) Tel. J. 98-34.

Internacia Radio-Asocio. — *Fondo*: 1924. — *Organizo*: Individuaj anoj, esperantistoj kaj ne-esp. interesataj pri radio. — *Celoj*: Faciligi rilatojn inter Radiuloj tutmonde per la lingvo Esperanto, liveri teknikan helpon kaj informon de internacia karaktero per Esperanto al ĉiu interesata pri Radio, Esperantisto aŭ ne. Ellabori la Esperantan radio-vortaron. Eldoni "Internacia Radio-Revuo", kiu, interalie, per Esperanta resumo de originalaj artikoloj el diversaj lingvoj, disponebligos al la legantaro teknikajn dokumentojn alie nehaveblajn, kaj kompreneblajn nur tre malfacile. Pritrakti ĉion alian, kio estas en la kampo de Internacia Radio-Asocio — *Kot.*: En Britlando: 1 šil.; alilande 1 Fr. sv. pagebla al la Hon. Sekretario aŭ la Naciaj sekretarioj. — *Gazeto*: Internacia Radio Revuo. — *Estraro*: Honora prez.: ED. BELIN; Prez.: Dro PIERRE CORRET; Sekr.: E. AISBERG, 18 rue Gérando, Paris IX.

Naciaj sekretarioj:

Argentina: Sro A. BARROS, Congreso 5155, Buenos-Aires.
Aŭstralia: Sro L. E. PFAHL, Croydon Park, Sydney, N.S.W.
Aŭstria: Sro M. TRENNER, Zirkusgasse 27/3, Wien 2/1.
